

JOOST VAN DEN VONDEL
GYSBREGHT VAN AEMSTEL

LA DETRUO DE LIA URBO KAJ LIA EKZILO

TRAGEDIO

URBS ANTIQUA RUIT
(LA ANTIKVA URBO PEREAS)


EL LA NEDERLANDA ORIGINALO TRADUKIS


IR. J. R. G. ISBRÜCKER



ZUTPHEN - W.J. THIEME & CIE - MCMXXXII







3781

A 20.



JOOST VAN DEN VONDEL.

605824
†

JOOST VAN DEN VONDEL

GYSBREGHT VAN AEMSTEL

LA DETRUO DE LIA URBO KAJ LIA EKZILO

TRAGEDIO

URBS ANTIQUA RUIT
(LA ANTIKVA URBO PEREAS)

EL LA NEDERLANDA ORIGINALO TRADUKIS

IR. J. R. G. ISBRÜCKER



ZUTPHEN — W. J. THIEME & CIE — MCMXXXII



ANTAŬPAROLO.

Por la traduko de la „Gysbreght van Aemstel” de *Vondel*, kiu nun estas prezentata al la Esperantista legantaro, mi havis du motivojn. La unua estis la deziro, ke fine ankaŭ la klasika nederlanda literaturo estu reprezentata inter la verkoj, kiuj en Esperanta traduko trovos sian vojon tra la tuta mondo. La internacia lingvo jam ebligis al vasta publiko ekkoni ĉefverkojn el multaj lingvoj: ĉu ne estus eble ĉerpi ankaŭ el la trezoro de la riĉa nederlanda klasika poemaro verkon, kiu estus inda aperi sur la forumo de internacia beletristiko?

La deziro traduki iom akurate poemon el nacia lingvo en Esperanton kondukas al certaj malfacilaĵoj, kiuj trovas sian kaŭzon en la malsimila konstruo kaj la malsama karaktero de la lingvo de la originalo kaj tiu de la traduko kaj la tradukanto estas devigata adaptiĝi al kelkaj koncesioj por ke la produkto de lia laboro donu kiel eble plej fidelan bildon de la verko de la aŭtoro. En kelkaj jam pli frue aperintaj tradukoj de alinaciaj poemoj mi trovis, ke la tradukinto permesis al si diversajn liberecojn, kiuj ne povis plaĉi al mi. Mi opinias, ke klasika nacia verko decas esti tradukata en klasikan Esperanton: tio eble estas persona vidpunkto, sed mi mencias ĝin por klarigi la principojn sur kiuj mi volas bazi tian tradukon. La ĉefaj postuloj, kiujn laŭ mia ideo taŭga traduko devus kontentigi estas la jenaj: la ritmoj kaj la rimoj de la traduko estu egalaj al tiuj de la originalo, la nombro de la linioj estu precize la sama, la regulo pri la Esperanta akcento estu zorge aplikata kaj oni evitu — sen troa fanatikeco — la uzadon de neologismoj kaj naciismoj. La emo klopodi tradukon de klasika verko, sekvante tiujn ĉi regulojn, estis la dua motivo, kiu instigis min al tiu ĉi laboro. Mi petas la leganton rigardi

la rezultaton nur kiel provon, pri kies mankoj neniu estas pli konvinkita ol mi mem.

Miaj samlandanoj ne miros, ke elektante taŭgan verkon por traduko, mi unue pensis pri la plej fama inter la nederlandaj poetoj de antaŭaj jarcentoj, pri *Vondel*. Kaj sendube lia „Gysbreght van Aemstel” ĉiam estis lia plej ŝatata kaj plej populara verko, kiu ankoraŭ nuntempe estas ĉiujare ludata en la unuaj tagoj de Januaro en la Amsterdama urba teatro.

Poetoj, apartenantaj al malgrandaj nacioj, ĝenerale ne estas tre konataj ekster la limoj de sia lingva teritorio. Nur Nederlandanoj povas laŭ valoro taksi la riĉan, fortan lingvon de *Vondel*, kiu igis lin meriti la nomon „Princo de la nederlandaj poetoj” kaj mi ne povas esperi plene redoni tiun riĉecon de lingvo kaj stilo en traduko, kiu nepre kiel ĉiu traduko en kiun ajn lingvon devas postresti ĉe la originalo. Sed se mi sukcesis almenaŭ iom respeguligi en mia verko la belecon de la lingvo de *Vondel* kaj se mi povas ion kontribui al la konigo de lia nomo ekster nia lando por ke ankaŭ en internacia publiko li ricevu la honoron, kiun li meritas, mia cela estos atingita.

Al sinjoro J. H. J. Willems en Amersfoort, kiu estis tiel afabla tralegi la manuskripton de mia traduko, mi estas tre danka pro kelkaj rimarkoj, kiujn li faris.

LA TRADUKINTO.

ENKONDUKO.

Joost van den Vondel, laŭ deveno Sud-nederlandano, naskiĝis en 1587 en Köln, kien rifuĝis liaj gepatroj, baptistoj el Antwerpen. Jam kiel naŭjara knabo li transloĝiĝis kun siaj gepatroj al Amsterdam, kie li vivis ĝis sia morto en 1679. Dum sia tuta vivo *Vondel* estis vera Nederlandano kaj eĉ pli speciale Amsterdmano.

Li heredis de sia patro komercan entreprenon de silkaĵoj, sed la negocajn aferojn li grandparte lasis al la zorgoj de sia edzino, *Maeyken de Wolff*, kaj tiel li povis trovi la necesan tempon por siaj studoj kaj poetaj laboroj. Nur poste li kompletigis sian konon, akiritan en la lernejo: kiel 30-jara homo li lernis la latinan lingvon kaj eĉ dek jarojn poste la grekan.

Longan tempon *Vondel* povis vivi sen financaj zorgoj, sed la malbona konduto de lia filo poste senigis lin de la plej granda parto de lia kapitalo kaj en la aĝo de 70 jaroj la poeto devis akcepti oficon en la pruntoficejo por vivteni sin mem kaj sian filinon. Li plenumis tiun oficon ĝis sia 80a jaro, kiam la urbestrado de Amsterdam pensiigis lin kun plena salajro. Ankoraŭ 11 jarojn la maljuna poeto povis dediĉi sin al sia arto kaj eĉ en tiu tempo ne malvigliĝis lia laborforto.

Vondel ĉefe dankis sian artan edukadon al la klasika literaturo sed li estis pia homo kaj li prefere prenis siajn temojn el la Biblio. Liaj dramoj montras multe da simileco kun la mezepokaj misteraj ludoj. La spirito de la mezepoko altiris lin kaj estis kaŭzo de lia posta transiro al la Katolika Eklezio.

La tempo de *Vondel* estis riĉa je religiaj kaj politikaj disputoj kaj kiel sentema homo li ne povis ne partopreni en ili. Ĉiuj gravaj okazantaĵoj dum lia vivo respeguliĝis en liaj verkoj; inter aliaj impresis lin plej forte la politika proceso kontraŭ

Johan van Oldenbarneveldt, kiu finiĝis per la kondamno kaj senkapigo de tiu maljuna ŝtatisto.

En la ampleksa verkaro de *Vondel* ĉiuj specoj de la poeta arto estas reprezentitaj, sed laŭ sia karaktero li ĉefe estis lirika, eĉ en siaj dramoj.

Kiel jam dirite, la plimulto de tiuj dramoj pritraktas bibliajn temojn. Plej konataj estas: *Lucifer*, *Adam in ballingschap* (*Adamo en ekzilo*), *Joseph in Dothan* (*Jozefo en Dotan*) kaj aliaj. Tamen *Vondel* ankaŭ prenis kelkfoje siajn temojn en aliaj historiaj okazintaĵoj. En *Palamedes* li akre kritikis la tiamajn disputojn kaj la mortigon de *Oldenbarneveldt* en la formo de grekaj-trojaj scenoj; la „*Gysbreght*” estas tragedio, kiu prezentas pli malpli historian epizodon el la historio de Amsterdam.

Vondel verkis la „*Gysbreght van Aemstel*” kun speciala celo, nome por la inaŭguro en la komenco de 1638 de la nova Amsterdama teatro. Kiel ekzemplon li elektis la duan libron de la *Eneido* de *Vergilio*, kiu rakontas pri la pereco kaj detruo de Trojo. En letero per kiu la poeto dediĉis sian verkon al *Hugo de Groot* (*Hugo Grotius*) li esprimas sin en la jena maniero: „instigis min al tio la deziro (se eble) bruligi la belan fajron de Trojo en Amsterdam antaŭ la rigardo de ĝiaj enloĝantoj laŭ la ekzemplo de la dia Mantuano ¹⁾, kiu bruligis fajron, ardantan pli bonodore kaj majeste ol la ĉiela flamo, kiu konsumas la fenikson.”

Por kompreni la enhavon de la dramo oni devas koni kelkajn detalojn de la historio de Holando kaj de Amsterdam en la fino de la 13a jarcento. En tiu tempo Holando, tio estas proksimume la regiono, nuntempe okupata de la provincoj Nord- kaj Sudholando, estis graflando, kies estro, grafo *Floris la kvina*, tre favoris la levigantajn urbojn kaj pro tio ofte venis en

1) *Vergilio* naskiĝis apud Mantua.

VII

konflikton kun la nobeloj, kiuj malvolonte vidis la kreskantan potencon de la malestimataj burĝoj. Kelkaj nobeloj, inter kiuj *Gysbreght van Aemstel*, *Geraert van Velzen* kaj *Herman van Woerden* estis la ĉefaj, konspiris kaj sukcesis perfide aresti la grafon. Sed antaŭ ol ili povis transporti la arestiton al Anglujo ili estis persekutataj kaj atakataj de la kuniĝintaj burĝoj de Kennemerland kaj Waterland (Akvolando) kaj por malebligi la reliberigon de sia viktimo ili mortigis lin. Tio okazis en la jaro 1296. Kelkaj el la konspirintaj nobeloj estis mortigataj de la burĝoj, sed la tri suprenomitaj gvidantoj sukcesis forkuri. La filo de *Floris* nun estiĝis grafo *Jan la unua*, sed tiu ĉi jam mortis en 1299.

Evidente *Vondel* ne ĉerpis el la fontoj de la historio, kiuj nun estas konataj. Li prenis sian temon el latina kroniko de *Beka*, kies rakonto ne en ĉiuj rilatoj estas aŭtentika. Laŭ la koncerna, iom legenda rakonto *Gysbreght* revenis post la morto de grafo *Jan la unua* en sian urbon Amsterdam kaj fortikigis ĝin per pontoj, remparoj kaj turoj, por defendi sin kontraŭ atako de siaj malamikoj. Efektive la Haarlemoj kaj la Waterlandanoj sieĝis la urbon, detruis kaj bruligis ĝin kaj forpelis *van Aemstel*.

Tio estas la rakonto de *Beka*. Postaj historiaj esploroj montris, ke vere en 1304 Amsterdam estis sieĝata kaj okupata de la loĝantoj de Kennemerland kaj Waterland, sub gvidado de *Witte van Haemstede* kaj *Nicolaes van Putten*, sed en tiu tempo la sinjoro *van Aemstel* ne plu estis *Gysbreght* sed ties filo *Jan van Aemstel*, kiu rifuĝis al Utrecht.

Sur tiu pli malpli historia fono *Vondel* verkis sian dramon kaj li malŝpare uzis la liberecojn, kiujn oni permesas al la poeto kaj kiuj eĉ ofte prenis la formon de anakronismoj. Sed li plene sukcesis en sia celo, krei lokan-historian tragedion, kiu plaĉos al la amantoj de poezio kaj teatro kaj plenigos iliajn korojn per amo al sia naskiĝurbo.

En la jaro 1304 Amsterdam certe ne estis multe pli ol vilaĝo

VIII

loĝata de fiŝkaptistoj kaj komercistoj, sed ĉar evidente la Amsterdama publiko ne interesigis pri la konkiro de tia vilaĝo, *Vondel* anstataŭis ĝin en sia dramo per la „antikva, floranta kaj riĉa Amsterdam”. Kaj antaŭ la okuloj de la rigardantoj li disvolvas la bildon de la potenca komerca urbo de la 17a jarcento, kiun oni en tiu tempo ofte nomis „la Venecio de la Nordo”.

Krom tio *Vondel* adaptis sian temon al la jam menciita ekzemplo, kiun donis al li la *Vergilia* priskribo de la subiĝo de Trojo. Pro tio oni trovas en la dramo de *Vondel* multajn personojn, kiuj laŭ rolo tute korespondas kun la personoj el la Eneido. *Gysbreght* mem okupas la lokon de *Eneo*, lia edzino kaj infanoj tiujn de *Kreŭso*, la edzino de *Eneo*, de ties filo *Askanio* kaj de *Kasandro*, la filino de reĝo *Priamo*. Pro tio *Vondel* prezentas *Gysbreght* kiel homon en la forto de la vivo, kvankam en 1304 li vere jam estis kaduka maljunulo. Kaj pro la sama motivo li revivigis *Gozewyn*, la reprezentanton de *Priamo*, kvankam li longe antaŭ la tempo en kiu ludas la dramo mortis kaj *Willebord*, jam mortintan en 1292, kiu anstataŭas *Panton*, la pastron de *Febo*.

En la tragedio de *Vondel* eĉ ne mankas la famkonata „ĉevalo” de Trojo, al kiu la poeto donis la formon de ŝipo en kies interno sin kaŝis aro de la plej kuraĝaj soldatoj de la sieĝantoj. Al la ŝipo li donis la karakterizan nomon „la Marĉevalo”. Samtempe tiu epizodo revivigis antaŭ la rigardantoj la memoron pri la perruza konkiro en 1590 de la urbo Breda, kiun en torŝipo kaŝitaj militistoj liberigis de la Hispanoj. La spiono *Vosmeer* evidente ludas precize la saman rolon, kiun havas *Sinon* en la antikva historio de Trojo.

La intenco estis inaŭguri la „novan Amsterdaman teatron” la 26an de Decembro 1637 kaj pro tio *Vondel* okazigis la konkiron de Amsterdam en la Kristnaska nokto. Sed pro la kontraŭstaro de la protestantaj pastroj, kiuj volis malebligi la tutan prezentadon pro la en ĝi montrataj katolikaj ceremonioj, la

inaŭguro estis prokrastata ĝis la 3a de Januaro 1638. Evidente la dramo tre plaĉis al la Amsterdama publiko, ĉar ĝis la 16a de Februaro oni prezentis ĝin ankoraŭ 12 fojojn kaj dum la vivo de *Vondel* la teatraĵo estis entute ludata 119 fojojn. Laŭ teoria vidpunkto la tragedio certe havas iajn mankojn, sed la fakto, ke ĝis la nuna tempo ĝi ĉiujare estas prezentata en la Amsterdama teatro — ne la „nova” de 1638, kiu jam de longe malaperis — pravas, ke la publiko ĉiam laŭ valoro scias taksii ĝiajn vivajn scenojn kaj belan stilon kaj lingvon.

La nederlandaj eldonoj de la „*Gysbreght*” enhavas antaŭ la teatraĵo mem:

1. la dediĉan leteron, per kiu *Vondel* prezentis sian verkon al *Hugo de Groot*;

2. preludon en poezia formo, direktatan al la urbestro de Amsterdam okaze de la inaŭguro de la nova teatro. En ĝi *Vondel* menciis detale kiuj el liaj figuroj korespondas kun la personoj el la dua kanto de la *Eneido*;

3. laŭdan poemon, dediĉitan al *Nikolaes van Kampen*, la arkitekto de la nova teatro.

Ĉar mi opinias, ke la unuaj tri el tiuj artikoloj ne interesos la internacian nuntempan publikon, mi ne enmetis ilin tie ĉi. Nur la kvaran mi supozas sufiĉe utila por represigi ĝian tradukon.

MALLONGA RESUMO.

Gysbreght van Aemstel, sinjoro de Aemstelredam ¹⁾ kaj Aemsterland, vaginte longan tempon en ekzilo kun aliaj dignaj sinjoroj kaj nobeloj, pro la kaptado de grafo *Floris*, kiu subpremis la malnovan nobelaron kaj hontinde perfortis sinjorinon *Machtelt van Velzen*, la filinon de sia fratino ²⁾, revenis post la morto de la heredinto de la grafo en Aemstelredam: sed la grafanoj (inter kiuj la Kennemer- kaj Waterlandanoj ³⁾) estis la plej incititaj) sieĝis lin en lia urbo dum tuta jaro kaj por konkiri ĝin ili fine elpensis atencon kaj faris kvazaŭ ili forirus. La urbanoj persekutis ilin iun distancon kaj alkondukis arestitan *Vosmeer*, la ruzan spionon, senditan por trompi la Aemstelredamanojn. Al li, post demandoj de *Gysbreght*, tiu ĉi lasis la vivon kaj komisiis al li helpi treni al la urbo la vergoŝipon, nomatan la Marĉevalo (en kiu sin estis kaŝinta la floro de la kavaliroj kaj soldatoj kun la giganto). Je noktomezo, en la Kristnokto, antaŭ ol aperis la luno kaj kiam la burĝaro sen suspekto en sia fervoro estis enirinta la preĝejon, la en la embusko kaŝita trupo perfortis la Haerleman ⁴⁾ pordegon kaj *Vosmeer* bruligis la vergoŝipon kaj faris fajron en la tuta urbo. Post tio *Diedrick van Haerlem* kun sia soldataro, kiu sekrete sin kaŝis en la Katuizer-monaĥejo, kaj *Willem van Egmond*, kun la tuta armeo, reveninta malfrue en la vespero, eniris la urbon. Frato *Peter*, dekano de la granda preĝejo, venis kun la unua sciigo al la kastelo, kie sinjorino *van Aemstel* estis tre ĉagrenita pro sia sonĝo kaj vidaĵo. Pro tio sinjoro *van Aemstel*, sekvate de liaj plej kapablaj parencoj kaj kunuloj,

1) Malnova nomo por Amsterdam.

2) Tiu malnova legendo ne estas kredinda.

3) Kennemerland kaj Waterland (elp. Vaterlant) estas partoj de la nuna provinco Nordholando.

4) Haerlem, malnova skribmaniero por la nomo de la urbo Haarlem (elp. Harlem), okcidente de Amsterdam.

kuris al la Dam ¹⁾ kaj klopodis fari tie kaj aliloke ordon kaj protekti la preĝejon kaj la vendoplacon, sed ĉio estis vana: pri tio *Badeloch* estis informata de lia frato *Arend*. Ĉar intertempe la urbdomo estis atakita kaj okupita, *Gysbreght* de tie venis en la Klaerisse-monahinejon, dezirante savi episkopon *Gozewyn van Aemstel*, sian onklon kaj la abatinon *Klaeris van Velzen*, sian kuzinon; sed ili rifuzis tion. La malamikoj, atakante la abatejon, devigis la sinjoron forkuri trans la internan Aemstel. ²⁾ Vidante de tie, ke la nova urboparto estas perdita kaj ke la malnova ankaŭ brulas, kaj aŭdante, ke la rajdantaro transiras la Doele-ponton, li rifugiĝis al la kastelo kun aro da forkurintoj kaj rakontis al sia edzino la reston de siaj travivaĵoj. Same la kuriero baldaŭ poste raportis al li, kiel finiĝis en la abatejo kaj la tuta urbo. Tuj oni faris eliratakon el la kastelo, sed estis repelata, perdante *Arend van Aemstel*, kiun la frato enportis vunditan, post kio li tuj mortis. Baldaŭ venis sinjoro *van Vooren* por postuli la kapitulacon de la domo, sed *Gysbreght* brave rifuzis. Sed dum li klopodadis por ke lia edzino kaj liaj infanoj enŝipiĝu kun ĉiuj rifuĝintoj, mem intencante defendi la domon, aperis *Rafaelo*, unu el la sep anĝeloj, kiu konsilis al li iri kun ĉiuj siaj kunuloj sur la maron kaj al Prusujo por tie fondi urbon, kiu ankoraŭ nomiĝas Holando kaj li konsolis la pian heroon per la antaŭdiro de la estonta grandeco de Aemstelredam kaj de la feliĉo de liaj posteuloj: kaj tiam *Gysbreght* forlasis la kastelon.

La scenejo estas antaŭ kaj en la urbo kaj en la kastelo. *Gysbreght* diras la prologon ³⁾. La ĥoroj ⁴⁾ konsistas el Amsterdamaj virgulinoj, nobeloj, monaĥinoj kaj burĝoj. La tragedio komenciĝas posttagmeze je la tria kaj finiĝas en la mateno.

1) Ankoraŭ nun ĉefplaco en Amsterdam.

2) Parto de la nun kanaligita rivero Amstel en la interna parto de la urbo.

3) La solparolado en la unua akto.

4) La ĥoroj estis antaŭe ofte kantataj, sed estas nuntempe kutime deklamataj.

PAROLANTAJ PERSONOJ.

GYSBREGHT VAN AEMSTEL, elp. Ĥejsbrehĥ van Amstel.
WILLEBORD, elp. Vilebort, Patro de la Katuza Monaĥejo.
AREND VAN AEMSTEL, elp. Arent van Amstel, frato de
GYSBREGHT.

VOSMEER, elp. Vosmer, la spiono.

ĤORO DE AMSTERDAMAJ VIRGULINOJ.

WILLEM VAN EGMOND, elp. Vilem van Eĥmont, armeestro.

DIEDRICK VAN HAERLEM, elp. Didrik van Harlem, marŝalo.
KAPITANOJ.

PORDISTO DE LA MONAĤEJO.

ĤORO DE NOBELOJ.

BADELOCH, elp. Badeloĥ, edzino de VAN AEMSTEL.

FRATO PETER, dekano.

LIGANOJ.

ĤORO DE KLARISOJ.

GOZEWYN VAN AEMSTEL, elp. Ĥozewejn van Amstel,
episkopo de Utrecht, elp. Ŭtreĥt.

KLAERIS VAN VELZEN, elp. Klaris van Velzen, abatino.

ĤORO DE BURĜOJ.

KURIERO.

RIFUĜINTOJ.

LA SINJORO VAN VOOREN, elp. van Voren, kun la trumpet-
isto.

ADELGUND, elp. Adelĥont, filino de GYSBREGHT.

VEENERICK, elp. Venerik, fileto de GYSBREGHT.

RAFAEL, unu el la sep anĝeloj.

MUTAJ PERSONOJ.

KATUZANO.

SOLDATOJ DE EGMOND.

SERVISTOJ DE GYSBREGHT VAN AEMSTEL.

WITTE VAN HAEMSTEE, elp. Vite van Hamste, bastarda
filo de grafo FLORIS.

GYSBREGHT VAN AEMSTEL.

UNUA AKTO.

GYSBREGHT VAN AEMSTEL.

- Jen fine la justec' de Dio en ĉielo
Kompaton havis nun pri mi kaj la kastelo
Kaj ĝia loĝantar'; pro preĝo kun fervor'
De l'urbo pelis Li la malamikojn for.
- 5 Ni estis sen esper', kaj jen la sieĝanto
La kampon lasis jam sen ia defendanto.
Lin persekutas sur la digo al Harlem'
Dum ke li kuras for, la frato mia mem.
Simila estas mar', pro vento ondmovanta;
- 10 Jen per timiga voĉ' leono malsatanta,
La reĝo de l'bestar', dispelas kun terur'
Kruelajn lupojn for kaj tigrojn al forkur',
Kaj de la sanga mort' la vivon ili savis,
Ĉar dum ĉasado li ne jam viktimon havis.
- 15 La turno de la sort' ja tre surprizis nin;
La loko de l'arme' ankoraŭ montras sin
Per sabroj kaj pafil', senorde dissemitaj,
Kaj pro senkaŭza tim' el manoj forjetitaj,
Por ke en la forkur' ne ĝenu armilar'.
- 20 Jes, en la tago mem, post daŭr' de tuta jar',
De longa la sieĝ' remparo liberigas.
Pri nia savo jam la famo disvastiĝas.
Promesis ĵure sin landanoj de Kermer' ¹⁾

1) Kermerland, malnova formo por Kennemerland, parto de Nord-holando apud Haarlem.

- Kaj de la Waterland, ¹⁾ per fajro kaj per fer'
- 25 Detrui sen kompat' la homojn kun domaro
 Kaj ŝanĝi al tombej', al cindra ruinaro,
 Propraĵon mian laŭ la leĝ', kaj de l'honor'
 Senigi min pro venĝ' de Floris, ²⁾ la Sinjor',
 Pro kies fimortig' senkulpe mi suferas,
- 30 Pli ol alia hom' kun pacienc' toleras.
 Sed se kunkulpe en la krim' kunagis mi,
 Ĝi estis sen intenc', sen ruz' aŭ ambici'.
 Kuz' Velzen, kiun jam la propra venĝ' incitis,
 Kaj Woerden ³⁾ ruze min al la komplot' invititis,
- 35 Per falsa ŝajno de la faktoj trompis min;
 Sed celon kun intenc', mi nun malbenas ĝin,
 Tuj kiam vidis mi la krimon intencitan:
 Transporti al Angluj' la grafon arestitan;
 Rifuzis tion mi, por bono de l'homar',
- 40 Konsilis al kunven' kunvoki kun burĝar' ⁴⁾
 Nobelojn por de l'graf' kapricojn enlimigi
 Kaj ne al partopren' en la afer' instigi
 La reĝon fremdan, nek armeon trans la lim', ⁵⁾
 Nek ĉefon de la land' forigi lin per krim'.
- 45 El tio naskis sin marego da ĝenaĵoj;
 Trans urboj iris ĝi, kaj fortaj fortikaĵoj,
 Vilaĝoj pli ol cent, da ĉiaj homoj pli;
 Eterne ili ja riproĉos sin pro ĝi.
 Ne kontentigis sin, nek haltis la venĝemo, ⁶⁾

1) Waterland, parto de Nordholando, norde de Amsterdam.

2) Grafo *Floris V*.

3) *Woerden*, elp. *Vurden*.

4) *Vondel* tie ĉi donas la impreson, kvazaŭ jam en la tempo de *Floris V* la urboj kaj la nobelaro formus la registaron de la lando.

5) Aludas pri *Edvardo*, reĝo de Anglujo, kiu instigis la nobelojn al la komploto kontraŭ *Floris V*.

6) Nome sub *Jan van Avennes*, poste grafo *Jan II*, kiu sekvis *Jan I* kaj kiu persekutis la mortigintojn de *Floris* kaj iliajn anojn.

- 50 Eĉ malgraŭ persekut' kruela ĝis ekstremo
 De l' gent' de Velzen kaj de lia parenkar'.
 La urboj en plimult' kaj nova nobelar'
 Starigis inter si kontrakton tre severan,
 Kun sigelita akt' kaj ĵuron plej sinceran,
- 55 Malame, sen pardon', ĝis fin' de l'histori',
 Al Woerden, Aemstel kaj de Velzen famili'
 Ofendon venĝi sen pri pac' aludoj iaj.
 Blazonon kaŝas pro subprem' parencoj niaj,
 Imposton pagas por vivadi en trankvil',
- 60 Kaj de la nobelar' forrestas alta bril'.
 Ne helpis interven' de reĝo aŭ nobelo;
 De la fidela urb' detruo estis celo,
 Kun tuta la burĝar', fidela ĝis la fin'.
 Esperon havis ni, ke plimildigus sin,
- 65 Pro tempo, de l'venĝem' popola la akreco.
 Dum multaj jaroj mi pro ĝi en ekzileco
 La vivon trenis ja; kaj kiam do la sort'
 Destinis filon de graf' Floris al la mort', ¹⁾
 Esperis mi sen ĝen' de tiu ĉi burĝaro,
- 70 Reveni al posed' de mia bienaro ²⁾
 En Vecht- kaj Aemstelland'. Sed vana la esper'.
 Kaj estus por mi mem malgrava nur afer'.
 Mi lasus ja min mem sentime dispecigi,
 En ia manier' kruele turmentigi
- 75 Laŭ plej tirana plan', se de la kulp' pro ĝi
 Absolvon havus la senkulpa famili',
 Edzino kara kaj la subular' bonvola.
 Preferus morton por ilia ben' mi sola.
 Abismen ĵetus min, por esti la ofer' ³⁾

1) Kiam mortis *Jan I*, filo de *Floris V*.

2) Vecht- kaj Aemstellando (elp. Veĥt- kaj Amstellando)
 estis bienoj de *Gysbreght*, sude de Amsterdam.

3) Aludo pri la sinofero de *Curtius* en Romo.

- 80 Por kontentigo de malsata la infer'.
 Ja tion scias Di'; el supre rigardante,
 La kaŝitaĵojn per okuloj klarvidante,
 Malkovras ĝis la fund', kaj korojn konas Li.
 Pro tio en la fin' pravigon havis mi,
- 85 Kaj per de l'venko kron' Li glore ja min benis
 Kaj kontraŭ la potenc' de l'malamik' subtenis,
 El kies kapo jam foriĝis la memor'
 Pri nia por la graf' kaj la popol' fervor',
 Montrita longe jam, fidele kaj konstante.
- 90 La homojn el Kermer' kaj Waterland gvidante,
 La patro mia (ne pro volo, sed neces'),
 Batalis kontraŭ la nobeloj kun sukces'.
 Pro tio portis li de ĉiuj la malamon;
 Pri ĝi Vilhelmo, reĝ', ¹⁾ konigus lian famon,
- 95 Se iam el la tomb' reveni povus li.
 La grafon Floris plej fidele servis mi,
 Dum ke li, juna knab', ne povis diri vorton.
 Revenĝis juste mi kun li de l'patro morton.
 Ostaron ²⁾ trovis kaj la Frizojn punis ni;
- 100 Sekreta konsilant', la grafon helpis mi;
 Armeon flandran mi, kun Brero, venkis glore: ³⁾
 Standardon en Kazant' forportis mi fervore,
 Ĉar tiam kontraŭ vol' de Guido ⁴⁾ graf' Floris'
 Edzinon serĉis por la filo ĉe l'Tamis'.

1) Grafo *Vilhelmo II*, patro de *Floris V*, estis roma reĝo de Germanujo. Antaŭ sia kronado kiel imperiestro li mortis en batalo kontraŭ la Frizoj. Nur poste oni trovis lian de la Frizoj kaŝitan kadavron.

2) La ostaron de *Vilhelmo II*.

3) En 1295 *Dirk van Brederode* (*Brero*) venkis la Flandrojn ĉe Kazant (nun nomata Cadzand) en la nuna provinco Zeeland (elp. Zelant), sude de Holando.

4) Kontraŭ la deziro de grafo *Guido* (elp. Gido) aŭ *Guy* (elp. Gi) de Flandrujo *Floris* serĉis edzinon por sia filo *Jan* en Anglujo (ĉe la rivero *Tamiso* = Thames).

- 105 Invadis tiam ja en Walchren ¹⁾ flandraj rotoj.
 Trans maro iris mi, al li per kron' de l' Skotoj ²⁾
 La kapon kroni, sed ne volis ĝin la sort'.
 Al grafo kaj popol' mi servis ĝis la mort'.
 Kaj tamen en kiras' la trupoj nun kuniras,
- 110 Pri Amsterdam kaj mi la venĝon nur deziras,
 Dum nokt' kaj tago kaj ignoras, ke la flam',
 La kaŭzo de l'brulad', devenon prenis jam
 En grafa voluptec', perforto sen honoro
 De mia parenin', de Velzen bela floro,
- 115 Kaj kontraŭ nobelar' farita maljustec',
 Eĉ malgraŭ grafa ĵur'. Ho, homoj, se blindec'
 Okulojn viajn ne pro venĝo malklarigas,
 Sendube tiam vi facile min pravigas.
 Delonge oni jam sklavigi volis min!
- 120 De graf' kaj episkop' ³⁾ mi vice spertis ĝin!
 En episkopa land' ne taŭgis sango nia: ⁴⁾
 Ĉe l'Rejn' ĉefepiskop' rigardis per envia
 Okul' al nia glori, de l'kap' de Gozevin'
 La mitron prenis kaj al kuzo donis ĝin.
- 125 Kaj Woerden kaj min mem, post vana la batalo,
 Triumfe gvidis li, ĉe l'flanko de l'ĉevalo,
 Publike en Utreĥt', pli honte ol la mort'.
 Kastelon de Vreland' mi perdis, li Montfort. ⁵⁾

1) Walchren, nuntempe Walcheren (elp. Valĥeren) estas unu el la insuloj, el kiuj konsistas la provinco Zeeland.

2) Post la morto de reĝo *Aleksandro* de Skotlando *Floris V* estis unu el la kandidatoj por la skota krono.

3) De la grafo de Holando kaj de la episkopo de Utreĥt (elp. Ŭtreĥt). La nuna provinco Utreĥt kun la samnoma ĉef-urbo en tiu tempo estis episkoplando.

4) La ĉefepiskopo en Kolonjo forprenis la episkopan rangon de *Gozewyn van Aemstel* (elp. Ĥozevejn), episkopo de Utreĥt, kaj donis ĝin al sia kuzo *Hendrik van Vianden*.

5) La kastelo Vreland estis fondata de episkopo *Hendrik* por ŝirmi sin kontraŭ *Aemstel*. Sed lia malforta sekvanto *Jan van Nassau* (elp. Nasaŭ) cedis la domon al *Gysbreght* kaj same la kastelon Montfoort (elp. Montfort) al *Woerden*, kontraŭ kiu

- Kastelon vere mi nur sub kondiĉo tenis,
 130 Sed ĝi laŭcele nur al mia lando ĝenis.
 La graf' en arestej' sep jarojn tenis min,
 Kaj Zwaenenburgh pro fort' mi fine cedis ĝin. ¹⁾
 Post ĵur' de fidelec' mi nur vasalo restis
 En lando, kie mi la sola ĉefo estis,
 135 Dependa ne de hom', responda nur al Di'.
 Ho, tiom da subprem' suferis tamen mi.
 Sed Haerlem certe laŭ la kulpo antaŭiras;
 Pro propra la profit' detruon ĝi deziras,
 Laŭŝajne por la graf', de mia forta mur',
 140 Sed fakte al profit' kaj veng' ĝi celas nur.
 La Frizojn kun Zeland' kaj Holland alvokinte,
 Grandecon volas ĝi, la mian detruinte.
 Jen estas la afer' laŭ mia opini'.
 Atakojn dum sieĝ' sen tim' toleris mi,
 145 Dum tago kaj dum nokt' sur la rempar' luktante;
 Kuraĝon donis mi, tre brave atakante;
 La frato mortis ja, de vundoj la ofer'; ²⁾
 Malpacojn solvis mi; dum fajro kaj mizer'
 Mi kvazaŭ patro por la homoj ĉiam estis.
 150 Eĉ dum malvenkoj mi kuraĝa daŭre restis.
 Ne fierigis min prosper', nek gloris min
 De l'kontraŭulo mort'; kaj eĉ mi nomas lin
 Malvole malamik', ĉar kontraŭ mi konspiris
 Kaj glavon kovri eĉ per mia sang' deziris.
 155 Nescion kun erar', mi ja pardonas ĝin;
 Ke Dio, pri justec' juĝant', protektu min,

tiu kastelo devis ŝirmi la episkopon. Poste *Jan van Nassau* re-postulis la kastelojn, sed nur kun la helpo de *Floris* li sukcesis rehavi ilin. *Floris* metis *Gysbreght* en malliberejon kaj forpelis *Woerden* el la lando.

1) La kastelo Zwaenenburgh (elp. Zvanenbörh) eble troviĝis sur la alia bordo de la IJ, norde de Amsterdam.

2) Aludas pri *Otto van Aemstel*, kiu tamen laŭ la historio ne estis frato de *Gysbreght* kaj ne mortis en Amsterdam.

- Li, ĉies konsolant' en de l' ĉiel' sidejo.
 Sed jen la patro de l' Kатуza monaĥejo ¹⁾
 De flanke venas jam, por eksaluti min,
 160 Ĉar nia feliĉec' ja tre ĝojigas lin.
 Plej bone certe li, honesta vir', sciigis,
 Pro kio la arme' subite retiriĝis.

WILLEBORD, GYSBREGHT VAN AEMSTEL.

WILLEBORD.

- Nobela kavalir', kun via urb' kaj vi
 Jesuo estu kaj vin ĉiam helpu Li
 165 En ĉia malfeliĉ. La fratoj de l'ordeno
 Kaj mi ekĝojas jam, kaj estas kvazaŭ beno
 Perfekta de l'ĉiel' nin trafus sur la ter'.
 Jam kantas monaĥej', ne ĝojas kun prefer'
 Ĝi pro la sankta fest' kaj plej supera horo,
 170 Festata en preĝej' por de Mario gloro,
 La virga Dipatrin' kaj Kristo, la Savint',
 Krucmortigita fil', de dorna kron' portint',
 Pli ol pri sort' de vi, nun jam liberigita
 De l'abomeno de milito malbenita.
 175 Ĉar la malamikar' decidis al forkur',
 Armilojn kun tendar' lasante pro terur',
 Kaj kion plie al la viaj ili cedas.
 Forpelis ilin ja anĝel' de Di', mi kredas.
 Simile la arme' de l' reĝ' de Asiri' ²⁾
 180 Ĉe urb' Jerusalem minacis al Ĥizki';
 Sed sin dum unu nokt' mirige ŝanĝis tio,
 Kaj silentigis lin la Ĉiopova Dio.

1) La Kатуza (Kатуizer, elp. Katözzer) monaĥejo nur estis fondata en la fino de la 14a jarcento kaj troviĝis ekster la urbo ĉe la Harlema pordego.

2) Aludas pri la mirakla liberigo de la urbo Samario el la okupo de *Sanĥerib*. Vidu II Reĝoj, 18 kaj 19.

- Minacojn aŭdis mi, kun multa blasfemad',
 Venejnon, galon kaj pri morto kaj brulad'
 185 Vekriojn kaj dum jar' insultojn oni diris
 Kaj per la dentoj jam en penso vin disŝiris.
 Vivantan oni vin katenis sur la rad';
 Alia pensis pri en najlbarel' rulad',
 Aŭ volis kapon per fandita or' bruligi.
 190 Nenio povis la tumulton silentigi.
 La karnon kun la sang' jam ĉiu donis for,
 Disputis pri l'ostar' kaj pri la haŭto por,
 Post taŭga preparad', ĝin streĉi sur kaldrono,
 Eterna avertil' por ĉiu ajn fripono.
 195 Sed dank' al Dio, ĉar malicon venkis Li.

GYSBREGHT.

- Neniu protektant' fidinda pli ol Di'!
 Piega patro, ke vin rekompencu Kristo
 Pro de l'fratar' kaj vi fidelo kaj persisto
 Por mi. Mi fidas, ke, preĝante kun fervor',
 200 Batalis vi por ni dum ĉiutaga hor',
 Kaj kontraŭ fajro kaj atakoj nin defendis;
 Senpova la armil', se Di' ne helpon sendis,
 Kaj sen fervora preĝ' de via piular'.
 Minacis ankaŭ vin de l'malfeliĉ' nubar'
 205 Malhela, kiam la armeo tie estis;
 De l'benoj de l'milit' vi ne libera restis.

WILLEBORD.

- Pro ili trafis nin neniom da dolor'.
 Nek ĝenis ili la monaĥojn en labor'.
 Kaj kun persisto ni daŭrigis la aferon.
 210 Ne rabis ili en arbej' eĉ unu beron,
 Nek fiŝon en laget', nek vitron en preĝej'.

GYSBREGHT.

De l'soldatar' konduť ja min mirigas plej,
Ĉar kio povis do la homojn decaj teni?

WILLEBORD.

Per enloĝigo nin ne volis Egmond ĝeni,
215 Krom tio, ke li mem kun sia ĉefgardi'
(Tre deca laŭ konduť), ekloĝis tie ĉi;
Kaj super la pordeg' blazonon li fiksigris
De l'graf' kaj tiel nin en trankvilec' dormigris.

GYSBREGHT.

Ĉi tio trafas min ja kvazaŭ bonodor'.
220 En urbo timis ni pri vi dum ĉiu hor',
Kaj kredis longe vin rabitaj, forpelitaj.
Sed patro, diru do, ni estas mirigitaj,
Pro kio la arme' subite iris for,
Anstataŭ en malam' persisti kun fervor'.

WILLEBORD.

225 Ne miru, nur neces' devigi ilin povis.

GYSBREGHT.

La miaj tamen ne atakis, nek sin movis.

WILLEBORD.

Vin trompas nun la ŝajn', ne estu ja erar';
Interbatalas nur pro frost' la rabbestar':
Simile en arme'. Se aŭdos vi volonte,
230 Pri kio aŭdis mi, raportos mi rakonte,
Pri tio, kion eĉ hodiaŭ vidis mi.

GYSBREGHT.

Piega patro, jes, pri ĝi raportu vi.

WILLEBORD.

- La ĉefoj, aŭdis mi, refoje kaŝparolis,
Okupi Amsterdam dum nokto ili volis.
- 235 Sed inter Diedrick mem kaj Egmond estis nun
Disputo pli kaj pli, kaj ĉiu havis kun
Si parton de l'anar' kaj havis la intencon
Laŭ propra opini' ekfari la atencon.
Por solvo del l'konflikt' klopodis ĉefular';
- 240 Sed Diedrick sen raci', obstina sen kompar',
Kaj kiu kriojn nur por argumentoj konis,
Persistis en obstin', ĉar helpon al li donis
En ĉio longa Klaes van Kyten, la gigant', ¹⁾
El Sparenwoude, kaj fiera arrogant'.
- 245 Per sia raŭka voĉ' li Egmond konsternigis,
Per pugnobato eĉ sur tero lin kuŝigis
Momenton sen konsci'. Sed multajn la ofend'
De l'estro, pro honor', instigis al defend';
Kaj se ne timo pro gigant' malŝata estus,
- 250 Tre certe oni ne en daŭra paco restus.
Sub sama la standard' atakus ili sin.
Kriado dum semajn' ne plibonigis ĝin.
Kaj kreskis kun malam' disputoj kaj malfido.
Ne pri la urbo plu, sed temis pri perfido.
- 255 Hodiaŭ en silent' kunvenis la estrar'
En monaĥejo por pacigo de l'anar';
Sed vane: oni eĉ preferis bataladon,
Por solvo de l'disput' nur volis uzi spadon,
Anstataŭ intertrakt', trankvile, kun cedem'.
- 260 Refoje al la grup' mi nun alpaŝis mem.

1) *Klaes van Kyten* (elp. Klas van Kejten), la giganto el Sparenwoude (elp. Sparenvaŭde), estas historia persono, sed ŝajnas, ke li estis bonkora kamparano kaj ne la sangavida homo, kia *Vondel* pentras lin.

- Mi ekparolis kaj pri paco readmonis:
 Bravuloj, al arme' protekton Dio donis,
 Ĉar en konkordo nur al ĉiu malamik'
 Respekton povis vi altrudi kun efik'.
- 265 Malpaco estas pest', por ĉiu malŝatinda;
 Pripensu por la urb' vi estos atakinda;
 Ĉar kontraŭ Aemstel do protektos kio vin,
 Se ĉiuj kaŝe kun suspekt' rigardas sin?
 Surprize estos vi venkita aŭ kaptita.
- 270 Sur kiajn vojojn kun paŝtist' erarigita
 Brutaro iros do? Decidon prenu vi.
 Kaj pri konkordo aŭ forir' konsilas mi.
 Reiru al la hejm'. Pro kio komencota
 Laboro aŭ agad', neniam eĉ finota?
- 275 Sendube la konsil' ne restis sen efekt'.
 Aŭskultis ili kaj vekigis jam suspekt',
 Kaj timo pro danĝer' minaca de l'remparo
 Kaj pro atako de la tuta loĝantaro.
 Vi estis jam dum voj', disiĝis la ide':
- 280 Ekregis mortterur'. Kuniĝis la arme'
 Sekrete por forir', sen signo anoncanta
 De korno aŭ trumpet' aŭ de loĝej' brulanta.

GYSBREGHT.

- Al mi kaj al la urb' tre multe servis vi:
 Jen virto, kiun en memoro tenos mi.
 285 Pri preĝoj petas mi, ĉe la altaro via. ¹⁾

WILLEBORD.

Eterne prenu vin Jesu' en gardo sia.

2) La sinsekvo de 4 longaj linioj ankaŭ aperas en la originalo. *Vondel* faras tion foje kiam ŝanĝigas la scenoj.

AREND VAN AEMSTEL, GYSBREGHT VAN AEMSTEL,
VOSMEER.

AREND.

Eksonu, frato, nun la sonoriloj ĝoje.

GYSBREGHT.

Ĝis kie sekvis vi al la arme' survoje?

AREND.

Ĝis apud Slooterdijck, arkpafon preter ĝi. ¹⁾

GYSBREGHT.

290 Kun kia rezultat'?

AREND.

Forkuris antaŭ ni,
Safaro antaŭ lup', la trupoj malamikaj.
Por ni do restis la armiloj senefikaj.

Kaj multon rabis ni. Sed sen rigard' aŭ vort'
La Kermeranoj eĉ, pro timo de la mort',
295 Kurante por batal' neniun emon sentis.

GYSBREGHT.

Pro formordita krest' la koko ja silentis.
Simile hundon pro malvenko vidis vi.
Silente voston kun orel' mallevas ĝi.
Sed kia birdo en katenoj kun vi venas?

AREND.

300 Li al de l'forkurint' birdaro apartenas;

1) Slooterdijck (elp. Sloterdejk) estis vilaĝo ekster Amsterdam, ĉe la vojo al Haarlem. Estas dube, ĉu ĝi jam ekzistis en 1304.

Ekstere de la dig' kaptita en la ŝlim'.
Mortpala estas li! kaj tremas li pro tim',
Ĉar oni trenis lin kaj tiris kaj insultis.

GYSBREGHT.

La furiozo al raci' nek rajt' aŭskultis
305 Se povon havis ĝi. Lin alkonduku nun.
La nomon? Kun deven'?

VOSMEER.

Sinjoro, via pun'
Min trafu. Malamik' de l'mort' ne trovos ŝparon.
Insidis ofte mi la urbon kaj burĝaron.
Milobla kulpo min kondamnis al la mort'.
310 Fatale nun de vi dependas mia sort'.
Ĉi tio al Kermer' kaj Waterland konvenos;
Sed malpli da dolor' la mort' per vi entenos
Ol per popolo mem, sendanka kontraŭ mi:
Fidelan servon ja ne rekompencas ĝi.

GYSBREGHT.

315 De kie venas vi? En kiu land' naskita?

VOSMEER.

Infano el Gojland', de Dio malbenita, 1)
En Haerlem dum junaĝ'. Nebona laŭ kondu't',
Mi baldaŭ kuris for de l'patro pro disput'.
La fremdaj mastroj dum la jaroj nun alternis
320 Kaj per la vivo mem mi kontraŭvole lernis.
Pro malriĉeco ja akriĝis intelekt';
Elpensis multon mi kaj celis al efekt',

1) Gojlando, regiono sudoriente de Amsterdam, kie *Gysbreght* antaŭe posedis bienojn. *Vosmeer* per tio esperas akiri la favoron de *Gysbreght*.

- Por min per brava ag' aŭ ruzo suprenigi,
Je kost' de aliul' en fino min riĉigi.
- 325 Sed ĉiam ĝis nuntemp' min mokis la destin',
Neniam pli ol nun. Fatal', mi scias ĝin,
Pli forta estas ol la hom' kaj lia stelo;
Projektojn niajn ĝi minacas per dispelo,
Kun plej facila gest'. Kun kiom da zorgad'
- 330 Kaj ruzo de l'atenc' fariĝis preparad',
Por la okupo de l'remparo atakita.
Se estus de Vosmeer la ŝipo direktita,
(Ĝi estis preta jam), ni estus sen erar'
Gajnintaj per ruzec', dum hor' anstataŭ jar',
- 335 Ĉi kion nek atak', nek la perfort' havigis.
Laŭŝajne io ja la estrojn sorĉblindigis.

GYSBREGHT.

Ekstaru kaj por mi nenion kaŝu nur.

VOSMEER.

- Mi liberiĝis ja de al Holando ĵur'.
Ne plu min Egmond nun ordonas aŭ devigas;
- 340 Per mortminaco li min al forkur' instigas.
Atencon vanan ni ne plu plenumis ĝin.
Sinjoro Gysbreght pro kompat' protektu min.
Vi povas patro kaj amiko por mi esti;
Pri la perfido mi ja volas nun atesti,
- 345 Kaj pri sekretoj de l'militkonsilantar',
Por pereigi vin kun via subular'.

GYSBREGHT.

Malligu lin, por ke senĝene li ĝin diru.

VOSMEER.

La estroj volis jam, ke la arme' foriru,

- Post kiam atakad' kaj batalad' sen fin'
 350 Dum tuta longa jar' ne progresigis nin.
 Perdiĝis homoj, pen' kaj tempo senprofita,
 Kaj ofte estis la gvidanto riproĉita
 Tre ĝene: kaj se ne lin tenus la honor'
 Kaj juro, certe li jam longe estus for.
- 355 Kaj se ĝi estus nur pli frue okazinta,
 La malbonsorto nun ne estus min trafinta.
 Ĉar pasis nur monat', de kiam faris mi
 Proponon en sekret' por fini ĉion ĉi.
 Kaj se sin riskus nur malmultaj liaj anoj,
- 360 Al urb' mi portus lin sur ambaŭ miaj manoj
 Kaj ekirante mem, sur vojo gvidus lin.
 Mi montris planon kaj al li klarigis ĝin.
 Kelkfoje dum la nokt' transnaĝis mi, spiono,
 Ĝis al gardejo kaj la granda bastiono
- 365 Ĉe bordo de la IJ, de l'urb' gardanta tur'. 1)
 Armilojn trovis mi kaj ŝtonĵetilojn nur.
 Trabori tra rempar' kaj ĉio estis eble,
 Horizontale kaj eĉ tute ne aŭdeble.
 Tuj kiam tra la breĉ' trairus soldatar',
- 370 Plenigus dum Kristnokt' plej taŭga bravular'
 En malprofunda lok' per vergoj la fosajon
 Por tra la bastion' okupi fortikaĵon
 Post la mortigo de la laca gardistar'.
 Ĝin sekvus la arme' trans digo, tra rempar',
- 375 Mortigus kio sin nur montrus inter domoj,
 Kaj kiam en preĝej' troviĝus ĉiuj homoj.
 Hodiaŭ estis temp'; la pruvon vidu nur:
 Jen forgesite kaj lasite pro forkur'

1) La IJ (elp. Ej) estis en tiu tempo margolfo, ĉe kiu kuŝis Amsterdam. Ĝi nun estas fermita per kluzoj ĉe la marflanko kaj multe malpligrandigita.

- La ŝipo kun vergar', la Marĉevalo, restis.
 380 Ho, kia tempo pro malpac' perdita estis.
 La estroj vivis en konstanta disputad',
 Kulpigis oni min. Mi celis al buĉad'
 De homoj sen util'; kaj estis malkonsento,
 Ke tiel riskus mi la homojn sen prudento
 385 Kaj pelus al la mort'. Jen unu opini'.
 Sed la aliaj tuj deklaris sin por mi.
 Dumtempe por atenc' la ŝanco preteriris.
 Kaj kelkaj nun al mi sin venĝi nur deziris.
 Jen venis kontraŭ mi da plendoj longa list';
 390 Arestis oni min, ĉar estis mi sorĉist'.
 Kaj penis per turment' konfesion eldevigi,
 Kaj eĉ kondamnis por hodiaŭ min mortigi.
 Sed rompis kamarad' katenojn dum vesper'.
 Ĉevalrapide mi forkuris de l'danĝer'
 395 Sur digo, sed pro tim' la morton tamen trovi,
 Mi iris flanken por min inter junkojn ŝovi.
 Mi restis en la marĉ' dum longa hor' post hor'.
 Silente vidis mi, ke ili marŝis for;
 Ĝis kiam viaj post la Kermeranoj iris,
 400 Pro mia helpokri' min el la marĉo tiris;
 Alie estus mi droninta en mizer'.
 Sed se mi devas, mi ja mortos kun prefer',
 Ĉar mi meritis ĝin, ĉe via urbpordego
 Ol per la miaj pro malprava malamego.

GYSBREGHT.

- 405 Libere iru for. Ne pensas mi pri pun'.
 La granda malamik' de ni foriris nun.
 Por bona pago vi en mian servon venu.
 La Marĉevalon tuj vi en la urbon trenu.
 La ĵus veninta frost' ne tuj forlasos nin;
 410 Kaj ĉie manko de lignaĵ' minacas min.

Ni la provizon de la vergoj tuj bruligu,
 Por ke ĝin kontraŭ ni neniu utiligu.
 La Gojlandano ja parolas en akord'
 Kun la rakonto de la patro Willebord.

HORO DE AMSTERDAMAJ VIRGULINOJ.

- 415 Plej dolĉajn voĉojn ni nun aŭdu.
 En siaj kantoj ili laŭdu
 La Dion, kiu sur la tron'
 Sidante en majest' ekvidis,
 Kun kiom da dezir' avidis
- 420 La Sparen al de l'Aemstel kron'. ¹⁾
 Kaj kiel venĝ' per lanc' kaj spado ²⁾
 Nur celis al senkronigado
 De l'urbo kun tutmonda fam'
 Kaj volis ŝiri per bandaro
- 425 La firman zonon de l'remparo,
 Trezoron rabi kun ornam'.
- Perfort' al nobla kaj fidela,
 Samkiel Velzenino bela, ³⁾
 Pli inda certe ol Helen'
- 430 Por brul' de Trojo renaskita,
 Por jarojn longa temp' milita
 Kaj venko post multobla pen'.
- Do kie estas la giganto,
 De l'urb' de Gysbreght minacanto?

1) La Sparen kaj la Aemstel estis la riveroj, ĉe kies bordoj kuŝis respektive Haarlem kaj Amsterdam. Do estas aludo pri la envio de la Harlemanoĵ pro la gloro kaj potenco de Amsterdam.

2) *Vondel* tie ĉi komparas la urbon kun virino kun krono sur la kapo, kontraŭ kiu la malamikoj atencis.

3) Aludo pri la perforto de *Floris V* al *Machtelt* (elp. *Mahtelt*) *van Velzen*.

435 Li volis ĉirkaŭpremi ĝin.
Ĉu do teruro lin timigis?
Ĉu ilin vana tim' instigis
Kun honto nun retiri sin?

440 Preĝejon nun ornami venu;
Ke oni dancu kaj festenu
Kaj malpezkore paru ni
Gajecon al la ĝoj' ĉiela;
Ĝin renovigas kant' anĝela
Dum naskiĝfesto de la Di'.

445 Eniru Aemstel, vi honore,
Ĉar venkis sen batalo glori,
Kaj, bravaj burĝoj, ankaŭ vi.
Kuraĝaj restis vi obstine,
Memoros oni vin senfine,
450 Eterne vin subtenu Di'.

D U A A K T O.

WILLEM VAN EGMOND, DIEDRICK VAN HAERLEM.
KAPITANOJ.

EGMOND.

Jen estas monaĥej', en kiu kun fratar'
Sin pace Willebord dediĉas al preĝar'.
Jam estas tempo por al estroj la klarigo
Pri kion celas ni.

DIEDRICK.

Ja plaĉos la sciigo!
455 Ne restu malcertec', nek dubo iu ajn.

EGMOND.

Aŭskultu bravular'; ni faris sub la ŝajn'
De malinterkonsent' la planon por atenco:
Akcelo de l'sukces' ja estis la intenco.
Pro ĝi hodiaŭ sin retiris la arme';
460 Sed tio estis ne de l'estro la ide',
Nek kion la popol' jam longe kaŝparolas.
La malamikon ni dum nokt' surprizi volas;
Ĉar ili kredas sin nun ekster la danĝer'.
(Ne dubu pri sukces'), jam antaŭ la aper'
465 De l'luno la arme' okupos fortikajon
Kaj vi akiros ja plej riĉan rabotajon!
En urbo kaj kastel' tre multon trovos vi:
La vojon al honor' al ĉiuj montros mi
Kaj al la virto por ke vi ĝin brave iros:
470 Premion gajnos vi, se vi ĝin nur deziros.

- Aŭskultu bravular' kaj bone armu vin;
 Sed viroj sen kuraĝ' de nun retiru sin!
 Kun kelkaj homoj nur la planon mi pretigis:
 Ĉe bordo de la IJ per vergoj mi ŝarĝigis
- 475 La Marĉevalon por kaŝej' de soldatar'.
- Laŭ peto la gigant' kun glora bravular',
 La floro de l'popol', de la granduloj kerno,
 Dumnokte kaŝis sin nun en la ŝipinterno:
 La frato Wouter mem, Abkou kaj Ryzenborgh, ¹⁾
- 480 Kun Arkel, Borsslen, Voorn, Put, Grobber,
 [Kulemborgh ²⁾
- Vianen kun la fil', espero familia,
 Kaj filoj de la graf': kaj laŭ spiono nia
 La ŝipon oni jam per zorgoj de Vosmeer
 En urbon trenis nun. Do preta la afer'
- 485 Por dum la nokto al pordego disrompota,
 Je lumsignalo el la Zwaenenburgh vidota,
 Sin ĵeti kun potenc', gvidate de la flam'
 De l'urbo, kiun do Vosmeer bruligis jam.

KAPITANOJ.

Ordonu nur por ke ni vin obei povos!

EGMOND.

490 Sed kie parto de l'soldatoj kaŝon trovos?

DIEDRICK.

Katuza monaĥej' ja estas apud ni.

EGMOND.

Ne estas enloĝig' ŝatata tie ĉi.

1) *Wouter*, elp. *Vaüter*; *Abkou*, elp. *Apkaŭ*; *Ryzenborgh*, elp. *Rejzenborĥ*.

2) Elp. *Arkel*, *Borslen*, *Vorn*, *Pot*, *Ĥrober*, *Kŭlemborĥ*.

KAPITANOJ.

Ne daŭros longe ja.

EGMOND.

Mi ĉiam volis ŝpari
La Dian domon.

DIEDRICK.

Nu, do lasu min ĝin fari.
495 Konduku, estroj, la gvardion tien ĉi:
La monaĥejon jam malferman trovos vi,
Se iom da potenc', mi juras, al mi restos.

EGMOND.

Dumtempe ĉe la urb' kun Vosmeer mi kunestos:
Li naĝos tra fosaj' je difinita hor'.
500 Ne ĝenu al fratar', koleron lasu for!
La voĉon igu ne ĝis en distanc' sonegi.

DIEDRICK.

Ne lasas sin soldat' de la papanoj regi!

PORDISTO, DIEDRICK VAN HAERLEM, WILLEBORD.

PORDISTO.

Jen, kiu frapas do?

DIEDRICK.

Malfermu, pro fratec'!

PORDISTO.

Dum la vespero ne utilas amikec';
505 Revenu dum maten'.

DIEDRICK.

Do kio tio estas?

Malfermu, diras mi.

PORDISTO.

La pord' fermita restas

Dum la malfrua hor'. Revenu dum maten'.

DIEDRICK.

Obeu, diras mi, aŭ trafu vin malben'!

PORDISTO.

Sed, kiu estas vi, kriante kun ekscito?

510 Ni ne plu pensis pri soldatoj aŭ milito.

Do, kio, dum la nokt', marŝalo, gvidis vin?

Je de l'arme' forir' ni kruce benis nin.

Mi ja esperas, ke vi nin ne ree ĝenos.

Sed estas sole vi? Ĉu ne la anoj venos?

DIEDRICK.

515 Mi sola. Voku vi la mastron tien ĉi.

PORDISTO,

Li fastas en preĝej' kun sia rozari'.

DIEDRICK.

La bonan patron tuj vi voku, mi deziras.

PORDISTO.

Jesuo, helpu, mi malbonon antaŭdiras.

Mi sonorigis kaj mi igis voki lin.

520 Malofte soldatar' ja feliĉigis nin;

Plej bone ĉiam ĝi dorsflanke ja aspektas.

DIEDRICK.

En domo kapitan' fidele vin protektas:
Ne estas plu bezon' je pordo aŭ serur'.

PORDISTO.

Protektos certe nin la granda Dio nur;
525 Neniam dormas Li kaj aŭdas nian ĝemon,
Ni preĝas nur pri pac', malŝatas militemon
Kaj pri malpaco ni nur aŭdas kun ĉagren'.
Unue trafas nin de la milit' malben'!

DIEDRICK.

Vi vivis tie ĉi dum la sieĝ' sen ĝeno.

PORDISTO.

530 Al Egmond dankas ni pro lia interveno.
Sed jen la patro mem, tre pala pro fastad'.

WILLEBORD.

Marŝalo, kion do?

DIEDRICK.

Mi petas pri gastad'.

WILLEBORD.

Bonvena estu vi, eĉ kvankam seninvite;
Volonte aŭdos mi, pro kio vi subite
535 Revenas dum vesper': do kion volas vi?

DIEDRICK.

Laŭ de Egmond' ordon' de vi nur petas mi
Soldatojn dum la nokt' en monaĥej' loĝigi:
Soldatan peton vi ja volos kontentigi

WILLEBORD.

Ĝi estas ŝerco nur?

DIEDRICK.

 Mi ja ne mokas vin,
540 Sed agas ĉar Egmond' al mi ordonis ĝin.

WILLEBORD.

 Mi ne komprenas ĝin. Ĉu Egmond' ĝin postulis?
 Neniam laŭ ordon' de li preĝejo brulis
 Laŭ mia opini' nur estas malkompren'.
 Jen estas mia man', sinjoro, por bonven'.
545 Malfermos ĝoje mi por vi kun aro via;
 Sed la preĝejon al milististar' malpia
 Aŭ kruda rajdistar' neniam cedos mi:
 Ĉar estas monaĥej' propraĵo nur de Di'.
 Tuŝante ilin vi okulon Dian tuŝas:
550 Min kredu, maleblec' min al rifuzo puŝas.

DIEDRICK.

 Nur daŭros horojn du, en maksimumo tri.
 La domon kun preĝej' ja garantias mi
 Kaj malutilon aŭ ĝenaĵon mi punigos.

WILLEBORD.

 Min garantio de soldat' ne kontentigos.
555 Mi al la ĉefo mem ĝin dirus sen hezit'.
 La monaĥejon ja, dum paco kaj milit'
 De longe aktoj kaj privilegi' protektas,
 Do, ĝin tuŝante, vi monarĥon malrespektas
 Kaj kronon trafas, se vi tuŝas al preĝej'.
560 Soldat' ne decas por Andrea ¹⁾ la sanktej'.
 Ne estu Diedrick nun la malamiko nia.
 Du Aleksandroj eĉ, la kvara kaj la tria ²⁾

1) La monaĥejo estis dediĉita al *Sankta Andreo*.

2) Aludas pri la papoj *Aleksandro III*, *Aleksandro IV* kaj *Urbano II*.

Kaj dua pap' Urban' konfirmis tion ĉi.

Honoron nur al Bruin pro tio ŝuldas ni. ¹⁾

- 565 Jes, por eviti, ke nin ĝenu ia bruo,
 Neniu havos la permeson por konstruo
 Proksime de l' preĝej', nek rajton tuŝi per
 Milit' aŭ militaĵ' al tiu sankta ter'.
 Nin imperia kaj de l'papo leĝ' protektas.

DIEDRICK.

- 570 Sed kontraŭ armilar' la leĝoj ne efektas!
 Pro neceseco ne insistu pri la leĝ'.

WILLEBORD.

Sanktaĵon rompos vi?

DIEDRICK.

Ĉar antaŭ Saul, reĝ'.

- Davido dum forkur' al Nobo same faris
 Kaj en la templo eĉ ne pastrajn panojn ŝparis;
 575 Neniu, krom la reĝ', ja rajtis fari ĝin. ²⁾

WILLEBORD.

- Pro de l'sanktaĵ' perfort' Uzija vidis sin ³⁾
 De sia sano laŭ justeco senigata;
 De Dio estas la pastraro protektata.
 Je tiu heredaĵ' ni rajtas laŭ destin'.
 580 De l'grafo la malben' fatale trafos vin
 Se niajn rajtojn kaj liberon vi insidos;
 Celante al atenc', sukceson vi ne vidos.

1) *Bruin*, elp. Bröjn, aŭ *Bruno* estis la fondinto de la Katuza ordeno.

2) Vidu I Samuel, 21, v. 1—6.

3) Vidu II Kroniko, 26, v. 16—21.

DIEDRICK.

Do kiel sonis vort' de l'graf', sen malkompren'?

WILLEBORD.

De l' tuta sanktular' kolero kaj malben'
 585 Ne trafos patron kaj la infanaron nure;
 Kun Judas, perfidint' de Dio, plej terure,
 Kun Lucifero kaj kunuloj staros li,
 Hontplena kondamnit', ĉe l'tribunal' de Di'.
 Ĉu pro teruro ne ektremas via koro?

DIEDRICK.

590 Malbenon diktis vi al grafa la sinjoro.

WILLEBORD.

Ĝi estu: tamen nun ne estas enirej'.
 Pro Dia naskiĝtag' jam ĝojas monaĥej'.
 Pro la supera fest' rezignu pri la plano.

DIEDRICK.

Ne helpas predikad', nek preĝo, Katuzano.
 595 Vi ne rifuzu la permeson por enir',
 Alie agos mi laŭ propra la dezir'.
 Jam urĝas tempo: la soldatoj ĵus aperas.

WILLEBORD.

Mi ne toleros ĝin kaj morton eĉ preferas.
 La fajron de l' infer', vi do ne timas ĝin?

DIEDRICK.

600 Nu, viroj, zorgu ke ni tuj varmigis nin
 Per fajro de la dom', de vi ekbruligata.

WILLEBORD.

Marŝalo, ĉesu do, ne estu senkompata.

Ne brulas monaĥej' per faro de Kristan'.
 Loĝejon kun trinkaĵ', kun varmo, lumo, pan'
 605 Kaj ĉion ni al la soldatoj ja proponas.

DIEDRICK.

Eniru, viroj, mi liberan vojon donas.

VOSMEER, WILLEM VAN EGMOND.

VOSMEER.

Sekrete tien ĉi mi naĝis tra kanalo;
 Nun atendigas min Egmondo sen kialo.
 Pro malsekeco mi frostremas en mallum'.

EGMOND.

Do kial Vosmeer ne ĉi tie estas dum
 Ke li promesis en ĉi tiu horo veni?

VOSMEER.

Jen estas mi ja mem. Se mi kuraĝas peni
 Atencon kun danĝer', mi zorgu pri la hor'.

EGMOND.

Bonvena, vi, bravul'. Vi estas viro por
 615 Sur via vorto eĉ preĝejon konstruigi.
 Sed pri van Aemstel nun bonvolu min sciigi.

VOSMEER.

Mi sukcesigos la atencon sen erar'.
 La Marĉevalon jam entrenis la burĝar'
 Kun kantoj kaj triumf', samkiel la Trojanoj.
 620 La ŝipon gvidis mi, sed sube niaj anoj
 Troviĝis en danĝer'. Tra en la fundo tru'
 Eniĝis akvo kaj atingis ĝis genu'.

- La soldataron ĝi minacis per la morto;
Sed ĉiuj regis sin, eĉ malgraŭ malkomforto.
- 625 La truo per si mem mirakle fermis sin,
Sed tiam la tusad' endanĝerigis nin.
La raŭkan sonon mi facile ja distingis,
Sed dank'al Dio ĝi orelojn ne atingis
De la urbanoj kaj do ne perfidis nin
- 630 Per nia propra gorg'. Mi kuraĝigis min
Kaj kantis kvankam kun pro zorg' premita koro,
Brupaŝis pro la frost' aŭ pumpis kun fervoro.
Al urbo venis ni; jen kvazaŭ akvofal'
La homoj ĵetis sin al nia Marĉeval'.
- 635 Vigliĝis la spirit' de l' tuta homamaso;
Ĝi trinkis al Vosmeer per kruco kaj per glaso.
Sed min konsternis nun de Gysbreght la ordon':
Alporti lignon al kastel' kaj bastion'.
Ĉar pro malvarmo kaj la longa sieĝado
- 640 Brulaĵo estis for. Mi helpis en portado;
Sajnis urĝon eĉ, sed tremis mia kor',
Ĉar baldaŭ de l' ferdek' la ŝarĝo estos for,
Sub kiu kaŝe sin la soldatar' kuŝigis.
Sed jam fariĝis nokt' kaj plendon mi aŭdigis
- 645 Pro troa lacegec'. Sufiĉos, diris mi,
Hodiaŭ la labor'; kun nova forto ni
Daŭrigos morgaŭ ĝin. Nun estas festotago
Post kiam la terur' de la holanda flago
Ne plu minacas vin, nek min per mortdanĝer'.
- 650 Mi do klopodis per regal' kaj monofer'
Ĝis morgaŭ en maten' prokrasti la laboron.
Rakonti ĉion ja postulus tutan horon:
Pri l' stato en la ŝip' kaj inter soldatar',
Pri disputado kaj malsama idear'.
- 655 Mi ofte ilin per minaco silentigis,
Sed eĉ per mortdanĝer' ne tute kvietigis;

Pri Arckel, kiu eĉ ektenis sur la kol'
 Ponardon propran kaj preferis morton ol
 Perfidi per tusad' la tutan kunularon.
 Nun faru ĉiuj ni de l'tasko la preparon.

La pro armitular' graveda Marĉeval'
 Akuŝos antaŭ ol aperos luno al
 Ĉielo, je noktmez'; kaj kiam ĉe l'altaro
 Amase preĝas sen suspekto la burĝaro,
 665 Jen senprokraste la duono de l'taĉment'
 Pordegon de Harlem' okupos en silent'
 Kaj rompos ĝin per fort'; mi en distanc' lumigos,
 La kavan ŝipon tuj per fajro ekbruligos
 En mezo de la urb' kaj inter la ŝipar'.

EGMOND.

670 Kun mil soldatoj por eniri tra rempar',
 En monaĥejo la marŝalo sin pretigas:
 Mi tuj al la arme' proksima ĝin sciigas.

VOSMEER.

Atentu general', reiras urbon mi.

EGMOND.

Al nia entrepren' sukceson donu Di'.

ĤORO DE NOBELOJ.

675 Nobeloj ni en festa hor'
 Preĝejon iras ĝoje por
 Ĉe l'piedetoj de l'Savonto,
 De reĝ' Herodo timigonto,
 La kapon klini en ador'.

680 Infano, kies brila stel'
 Por la saĝuloj estas cel',

Al naskiĝlok' malluma, gvido,
Ĝis en la urbo de Davido, ¹⁾
Humiliĝejo de l'ĉiel'.

- 685 La Orient' kun oferem'
 Vivtenas la Kreinton mem,
Per mirho, per incens' kaj oro,
Veninton el ĉiela gloro
 En la malriĉa Betleĥem.
- 690 Eĉ loĝas birdo en aer',
 En nesto, vulpo sub la ter',
En la arbaro kaj montaro.
Apenaŭ stalo por brutaro
 Kreinton ŝirmas de l'veter'.
- 695 Manguj' lulilo estas por
 De tero kaj ĉiel' Sinjor',
Nutranto de bestaro ĉia;
Infano, kun patrino via,
 Vin ne makulas pomp' aŭ glor'.
- 700 La el ĉiel' veninta Di'
 Nun en triumfo mokas pri
Kortegoj de la mond' fiera.
Humilan koron al supera
 Feliĉegec' kondukas Li.
- 705 Vizaĝo Dia tie ĉi,
 Al suno lumon donas Ĝi
Kaj belan brilon al stelaro.
Al kiu servas anĝelaro
 Sen bril' aŭ lumo kuŝas Li.

1) Betleĥem, la urbo de *David*.

- 710 Lin lulas la ĉiela flor',
 Per dolĉa voĉ' kantante por
 Li, nevenkito de l'dormemo.
 En reĝa urb' Jerusalemo
 Vekiĝas granda la sinjor'. ¹⁾
- 715 Aŭgusta regno sen honor'; ²⁾
 Potenco Roma iĝas for;
 Malŝatas Orient' Latinon.
 Sed eĉ ekstreman mondfinon
 Ja superregas la Sinjor'.
- 720 Ordonojn Liajn la infer'
 Aŭskultas kun ĉiel' kaj ter',
 Kaj ilin pura leĝ' tremigas;
 Li per fiŝistoj ĝin konigas ³⁾
 Kaj trumpetigas tra l'aer'.
- 725 Majeste pli ol la purpur'
 Infanon vestas tukoj nur,
 En kiuj Lin paŝtistoj vidas.
 Animojn Di' al li konfidas,
 Pri kio diris la aŭgur': ⁴⁾
- 730 Ke la ŝafaron paŝtos Di', ⁵⁾
 Danĝeron tenos for de ĝi,
 Demandos pri ŝafet' perdita,
 Kaj ĝoje kun ĝi, retrovita,
 Al la aliaj venos Li.

1) Reĝo *Herodo*.

2) La potenco Roma imperio ne plene sukcesis subigi la Orienton. La regno de Kristo estos pli potenca ol la plej granda mondregno.

3) Per la apostoloj, inter kiuj *Petro* kaj *Johano* estis fiŝistoj.

4) Laŭ la profetaĵoj de la Malnova Testamento.

5) Aludo pri la parabolo de la bona paŝtisto; vidu *Johano*, 10, v. 1—6.

- 735 Senvalorigas la saĝec',
 La pompo kaj la nobelec'.
Grandecon Dio ne deziras.
En la ĉielon nur eniras
 Renaskiĝinta humilec'.
- 740 Gvidanto, Vi, de princa kor',
 Vi, kiu estas la Sinjor'
De l'lumo kaj de l'mallumeco,
Insidon de la tiraneco ¹⁾
 De l'senkulpulo tenu for.

1) Aludo pri *Herodo* kaj la infanmortigo de Betleĥem.

TRIA AKTO.

BADELOCH, GYSBRECHT VAN AEMSTEL, FRATO PETER.
LIGANOJ, AREND VAN AEMSTEL.

BADELOCH.

745 Apenaŭ povis mi ornami min kaj vesti,
Por en preĝejo kun popol' triumfe festi,
Ĉar Dio pelis for armeon de l'rempar'
Kaj humiligis sin en stalo de brutar';
Jen mi en seĝo jam eksongis kaj dormiĝis
750 Kaj en teruro kaj kun timo revekiĝis:
Sur miaj vangoj ja la larmoj montras ĝin.

GYSBREGHT.

Sed kara, kial do mi tiel trovas vin?
Okulojn viajn la ĉagreno nebuligas!
Do venu, karulin', kaj ilin mi sekigas;
755 Nun donu kison kaj rakontu pri l'dolor'.

BADELOCH.

Pro ia zorgo ja premiĝas mia kor'.
En mia dormo mi eksciis teruraĵojn.
La sonĝo premas min. Mi timas la vidaĵojn.

GYSBREGHT.

La sonĝo trompas kaj ĝi erarigas vin.

BADELOCH.

760 Jen staris antaŭ mi Mahteldo, la kuzin', 1)

1) La mortinta edzino de *Geraert van Velsen*.

- Malgaje kiel ŝi, kun sama la mieno,
 Parolis ofte jam pri sia korĉagreno,
 La manojn tordis kaj ploradis en mizer',
 La harojn tiris eĉ en sia malesper';
- 765 La bruston gratis ŝi, la vestojn disŝirante,
 Kaj polvo kovris ŝin; apenaŭ mi, aŭdante'
 Ĝemadon, povis ĝin toleri kun tumult',
 Kaj kontraŭ l'grafo la blasfemoj kaj insult',
 De ĉasta nobelin' la perfortinto krima.
- 770 Ve, mi ne vidis ŝin en stato puranima,
 En kiu antaŭ Di' kaj la anĝela rond'
 Ŝi nun aperas post doloroj de la mond',
 En blankaj vestoj kun okuloj kiel steloj,
 Brulantaj supre en de l'paradiz' ĉieloj;
- 775 Kaj en neĝblanka man' palmbranĉon tenas ŝi.
 Kun larmoj kaj ĝemad' ŝin alparolis mi:
 Nobela ido, el de Woerden gent' naskito,
 Pro kies ofendiĝ' ekiris al milito
 Herooj kaj post ke ĉielon iris vi,
- 780 Ankoraŭ en malpac' batalas inter si.
 Pro kiu kaŭzo vi ĉagrenan vojon iras,
 Aŭ ĉu pro zorg' je ni vi venas kaj deziras
 La viajn helpi en sieĝo kaj dolor'?
 Sed Machtelt, estas jam la malamikoj for.
- 785 Ne zorgu, timas ni ne plu atakon ian,
 Do kantu vi kun ni triumfe laŭdon Dian;
 Ornamu kapon per lumanta laŭrokron'.
 Anĝelojn gvidu al dancad' en gaja ton'.
 Ŝi ŝajnis en koler', la kapon ekskuante,
- 790 Vizaĝon ŝanĝi kaj, la manojn disigante,
 Ŝi per malklara voĉ' de nun aŭdigis sin
 Kaj kun profunda ĝem' ekvokis en la fin':
 „Simpluloj, ĉu ne plu vi vidas malamikojn?
 Trankvile dormas kaj ne timas artifikojn?

- 795 Ĉar estas vi pro mi en via lasta hor',
 Proksima al pere'. Ne estas tempo por
 Nun dormi, sed por al aliaj regionoj
 Forkuri el la dom'. Jam falis bastionoj.
 La urbo brulas kaj la fajr' detruas ĝin;
- 800 Do vane kun burĝar' defendis Gysbreght sin.
 Ne plu vin helpas nun batal' nek kontraŭstaro.
 Jam lasis sanktular' preĝejon kun altaro.
 For, savu Gozewyn, Klaerisse, mian plej
 Amatan, antaŭ ol ekbrulas abatej'.
- 805 Ŝin ŝirmu kontraŭ la ofendo kaj perforto
 De iu ajn fripon' kaj savu ŝin de l'morto.
 Tra stratoj plenaj kaj gardataj kun sever'
 Mi Gysbreght sen de lanc' aŭ glavo mortdanĝer'
 Kaj sen ke fajro eĉ la vestojn bruletigos
- 810 Kaj tute sanan al ĉi tiu sojl' venigos.
 Kaj tiam de l'kastel', je Dio, iru for
 Al maro antaŭ ol jam pasos ĝusta hor'.
 De ventoj kaj pere' vin ŝirmos anĝelaro;
 Ĉe l'bordo sen danĝer' alvenos la ŝiparo."
- 815 Min en la dormo ja ekkaptis la terur';
 Stariĝis haroj kaj ne estis unu nur
 Sen akvoguto. Jam la ŝvito ekelvenis;
 La korpo frostis. Mi paroli vane penis
 Kaj timo el la sonĝ' tremantan vekis min.
- 820 La brakojn streĉis mi por ĉirkaŭpreni ŝin,
 Sed el la vido jam forflugis la spirito
 Kaj restis mire mi, de la fantom' trompito.
 Jen, kio ĝenas kaj maltrankviligas min.

GYSBREGHT.

Imago vana nur al vi altrudas sin.

BADELOCH.

- 825 O, estu vana ĝi! Sed pasis pro dormado
 Por iri al preĝej' la tempo.

FRATO PETER.

Glavoj! Spado!

BADELOCH.

La bona Dio nin protektu de l'danĝer'!
Mi aŭdas.... Ve, en song', mi timas tro da ver'.

GYSBREGHT.

Pro kio, frato, vi eligas tian krion
830 Kaj kuras dum la nokt'?

FRATO PETER.

Mi certe dankas Dion,
Ĉar mi de l'malamik' kun peno savis min.

GYSBREGHT.

Vi klaĉas? Malamik'?

FRATO PETER.

En urbo montras sin!
Pereas Amsterdam kun sia alta muro.
Ĝi fine cedas al la venĝo en teruro.
835 Pordegon la gigant' timiga prenis jam;
Malŝarĝas Marĉeval'; Vosmeer per fajr' kaj flam'
Atakas, meze de l'batalo insultante.
Jam cedas gardistar', apenaŭ batalante.
Envenas la arme' pli multenombra ol
840 Ĝis nun en Waterland kunigis la popol';
Kun Holland kaj Zeland', kun Friz' kaj Kermerano
Kaj ĉiu kontraŭ ni kolera enlandano.
Kristnokto servis por perfido antaŭ ol
La luno montris sin kaj kiam la popol'
845 Oferis en preĝej' kaj kantis en la ĥoroj,
Ĉar ĝojis pro naskiĝ' de Kristo ĉiuj koroj;

Kaj ĉar la pala mort' ne plu minacis nin.
Sed vane tiom la sieĝ' ŝvitigis vin;
Por sango kaj labor' nenion ni akiras!

GYSBREGHT.

850 Mi tuj la Turon de l'Plorantoj supreniras. ¹⁾
Servistoj, kaskon kaj kirason donu vi!

BADELOCH.

Ve, kia malfeliĉ' okazas nun al mi!
Ĉu tiel en triumf' vi venkis malamikojn?
Nun konu Haerlem kaj de Egmond artifikojn!
855 La enviintoj pri la urbo ridas nun.
La bona edzo dum la tago kaŝas kun
Dolor' ĉagrenon kaj dum nokt' ne dormi povas.
Mi ofte lin kun larm' sur liaj vangoj trovas.
Se mi demandas, en silento ĝemas li,
860 La koron fermas kaj min ĉagrenigas pli.
Ho, pli feliĉaj ja vilaĝoj simplaj estas;
Malaltaj domoj de l'venteg' ŝirmataj restas
Pli ol sinjora dom' altega, kun tegment',
Sur kiu rompas sin la muĝeganta vent'.
865 Se iu homo, mi ĉi tion rajtas diri;
La sperton povis mi dum mia viv' akiri,
De l'tempo, kiam mi ekestis fianĉin',
Trans mia kapo la ventegoj pasis min.
De kiu alta tur' sin montrus perspektivo
870 Sur la ondanta mar' de mia tuta vivo?

1) Ankoraŭ nun ekzistas tiu „Turo de l'Plorantoj“ (Schreierstoren), tiel nomata, ĉar en antaŭaj jarcentoj tie la edzinoj kaj infanoj de la maristoj adiaŭis siajn edzojn kaj patrojn, kiuj enŝipiĝis por siaj grandaj marvojaĝoj al Hindujo. Laŭ la legendo la turo devus esti unu el la turoj de la kastelo de *Gysbreght*, sed estas tre dube, ĉu ĝi jam ekzistis en 1304.

Kaj kiam estos jam de la batalo fin' ?
La edzon perdos mi, post Di' ŝirmintan min.

FRATO PETER.

Ne urĝu sinjorin', la siajn Dio provas!

GYSBREGHT.

- La tinton de la ŝtal' mi klare aŭdi povas
875 Kaj proksimiĝas la brudad' de armilar'.
Jam brulas en la IJ kaj brilas la ŝipar',
En Diemenlago ¹⁾ kaj en ĉiu urbfoŝaĵo;
Jam falis granda de Jan Witten konstruaĵo; ²⁾
La domon apud ĝi konsumas hela flam'.
880 La sonoriloj sin aŭdigas. Bruas jam
La tuta bordo kaj la sanga glavo regas.
Trumpetoj sonas kaj la homoj laŭtpleogas.
Kirason donu vi, servistoj, kun armil',
Por morti kun honor' kaj en soldata stil'.
885 Amikoj en mizer', liganoj, kiuj restas?

FRATO PETER.

- Plej bona grandular' jam ĉe la pordo estas:
Jen Heemskerck, pro de vi fratino en admir', ³⁾
Kun Oudshoorn kaj Polaen, blankhara kavalir' ⁴⁾
Kaj Zwieten, Teilingen, Varmond' kaj via frato ⁵⁾
890 Kaj Kuick kaj Kraeienhorst ⁶⁾. Eĉ tigroj pro malsato
Ne furiozas pli.

1) Antaŭa lago, nun poldro, apud la vilaĝo Diemen (elp. Dimen), sude de Amsterdam.

2) *Jan Witten* (elp. Jan Viten) estis riĉa burĝo, kies granda domo troviĝis en la okcidenta parto de la urbo.

3) *Gerrit van Heemskerck*, elp. Herit van Hemskerk.

4) *Oudshoorn*, elp. Aŭtshorn, *Polaen*, elp. Polan.

5) *Zwieten*, elp. Zviten; *Teilingen*, elp. Tejlingen (la ng kun naza sono); *Varmond'*, *Jacob van der Woude en van Warmond'*.

6) *Kuick*, elp. Köjk; *Kraeienhorst*, elp. Krajenhorst.

GYSBREGHT.

Tuj ili armu sin!

LIGANOJ.

Ni estas pretaj, se batalo helpos nin,
Kaj ĝoje sekvos vin en vivo kaj en morto.

GYSBREGHT.

Eterna rekompenc' ja estos via sorto
895 Pro tiu fidelec' en mia malesper'.
Vin ĉiuloke nur minacas mortdang'er',
Sed se ne timas vi laŭforte kontraŭstari
La malamikon kaj de l'vivo riskon fari,
Por urbo kaj burĝar', kuraĝe sekvu min!

LIGANOJ.

900 Ni sur la sama voj' sen tim' postiras vin!

BADELOCH.

La karan edzon vi, bravuloj, ja subtenos?

AREND.

Fratino, fidu min, mi ne sen li revenos!

ĤORO DE KLARISOJ. 1)

Kristnokto ol la tag' pli bela,
En vi radias lumo hela,
905 Herodo ne toleras ĝin.
Ĝin benas miloj en adoro,
Sed por racio lia koro
Fiera ne malfermas sin.

1) Ĥoro de monaĥinoj de la ordeno de Sankta Klara.

- 910 Por senkulpulon neniigi ¹⁾
 Senkulpajn igas li mortigi,
 Kaj en la urbo Betleĥem
 Kaj kampo vekas vekriadon:
 Plorĝeme faras rondvagadon
 El tomb' vekita Raĥel mem. ²⁾
- 915 Ŝi vagas tien kaj revene,
 Patrino sen konsol', ĉagrene,
 Pro perd' de l'kara infanar'.
 Ŝi vidas ilin sufokitajn
 En sang', apenaŭ nur naskitajn,
 920 Per ruĝmakula armilar'.
- Ŝi vidas, kiel lakto restas
 Sur palaj lipoj, kiuj estas
 Ŝiritaj for de la patrin'.
 Ŝi vidas etajn larmojn kuŝi,
 925 La vangon kiel roso tuŝi,
 Sangmakulitan vidas ĝin.
- Sub kurbaj brovoj ŝi ne vidas
 Plu okuletojn, kiuj ridas,
 Radas al patrina kor',
 930 En kiu ili, brilaj steloj,
 Elvokis bildon de l'ĉieloj,
 Pelitan nun de nubo for.
- Ho, tiom da mizer' kaj ploroj,
 De tiel multaj junaj floroj
 935 Forvelkis freŝa foliar',

1) Senkulpulo — la infano *Jesuo*. Vidu Mateo 2, v. 16.
 2) Vidu Mateo 2, v. 18.

Jam antaŭ ol ĝi sin etendis,
Matene bonodoron sendis
Por la ĝuigo de l'homar'.

940 Falĉilo falĉas la spikaron,
Ventego skuas foliaron,
Furiozante en arbar':
De blinda emo al potenco
Pro malkompreno konsekvenco;
Ne hontus ĝi pro krima tar'.

945 Malĝoja Raĥel, kvietiĝu,
Martiroj viaj idoj iĝu,
Unuaj de generaci'.
El via sango ĝi ekfloros,
Eterne Dion ĝi honoros,
950 Perforte ne pereos ĝi.

K V A R A A K T O.

GOZEWYN VAN AEMSTEL, KLAERIS VAN VELZEN,
ĤORO DE KLARISOJ, GYSBREGHT VAN AEMSTEL.

GOZEWYN.

- De Amsterdamo nun la fino baldaŭ venos
Kaj en la mizereg' ni ankaŭ partoprenos,
Se ne tuj ĉiu sin preparos al forkur'.
Al mi, maljuna vir', konvenas resti nur:
955 La vivo tiom ne por mi valori povos.
Jam pretan Dio min, serviston Sian, trovos.
Al Lia trono kaj ripozo venos mi.
Sed vi, filinoj, ĉar la vivon amas vi,
Ankoraŭ estas en de l'junaj jaroj ĝuo,
960 Pretiĝu al forkur', se helpos vin Jesuo
Kaj ŝirmos de l'danĝer'. Klaerisse, virgulin', ¹⁾
Malprave la malam' je l'patro premas vin.
Forkuru sen prokrast', vin sekvos la aliaj;
La malamikoj, pro venĝemo senraciaj,
965 Precipe serĉas vin. Forkuru do, patrin',
Per larmoj kaj preĝad' mi certe helpos vin,
Anstataŭ per pied' vin sekvos per la koro;
Infan' de Machtelt, for, se Dia la favoro
Vin povos savi, ĉar, mi plej kompatas vin.

KLAERIS.

- 970 Ho, patro Gozewyn! Vi ja ne konas min?
Se mi forlasus vin, ĉu tio estus deca?
Parenco mia laŭ naskiĝ' kaj spiriteca.

1) *Klaerisse*, elp' Klarise, *Klaeris van Velzen*.

Mi lasus tie ĉi vin sola en danĝer'!
 Ĉar kiel patro vi edukis min laŭ ver'
 975 De l'Krista kredo, jam de mia infaneco
 Kaj gardis korpon kaj animon en pureco;
 Mi ne forlasos vin.

ĤORO.

Nin ŝirmos la altar'.

GOZEWYN.

Vi, nobla virgulin', similas laŭ kompar'
 Al tiu Klaro mem, laŭ kiu vi nomiĝas; 1)
 980 Nenia diferenc' en tio eĉ troviĝas.
 La Saracenoj ĵus okupis per trupar' 2)
 La urbon, kiam kun kuraĝo Sankta Klar'
 Sin sub pordego de l'monahinej' vidigis,
 La malamikojn per rigardo fortimigis.
 985 Sin ŝirmis firma kred', kuraĝo kaj preĝad',
 Simile al kiras', al kasko kaj al spad'.
 La malamikojn do pro tiu ĉi deklaro
 Atendi povas vi kun mi ĉe la altaro.
 Sed vestu (por ke mi ne mortu sen honor')
 990 La lacan korpon per vestaĵo pompa por
 La rang' de episkop'; nin pretajn ili trovos.
 La mitron donu, ĝi la verton kroni povos,
 La konsekritan. Kaj tremantan manon vi
 Ornamu per la ring' el oro, kiun mi,

1) *Klaro, Sankta Klara*, la fondintino de la ordeno de la Klarisoj.

2) La Saracenoj, apartenantaj al la armeo de imperiestro *Frederiko*, kiu atakis la urbon Assise en Italujo, unue venis ĉe la monahinejo de Sankta Klara, kiu troviĝis ekster la remparoj de la urbo. Kvankam tre malsana, Sankta Klara igis sin porti kun la Sankta Sakramento sub la pordegon de la monahinejo kaj fervore preĝis, ke Dio savu la fratinojn. Aŭdiĝis voĉo, kiu diris: Mi protektos ilin, kaj tiam la Saracenoj forkuris.

- 995 Kun Roma eklezi' min edzigante, prenis.
 Bastono, kiu min dum maljunec' subtenis,
 Paŝtilo por ŝafar' de Dio, gvidu min.
 De l'rango signon¹⁾ mi neniam cedis ĝin
 Memvole, sed per fort', eĉ kvankam mi foriris,
 1000 Pro Henrick, Willem kaj du Janoj min retiris. ²⁾
 Ne ĉagreniĝas pro ofendo de l'honor',
 Sed pro Kristana sang' perdita, mia kor';
 Pro greno, de ĉeval' kaj homo detruita,
 Popol' senkulpa pro sinjora pek' punita.
 1005 Nun sidu, infanar', kaj en konvena ton'
 Laŭdkanton kantu de maljuna Simeon': ³⁾

ĤORO.

- Ho, Dio, al servisto Via
 Konsentu laŭ promesa vort',
 Ke iru li, laŭ peto sia,
 1010 En paco al la ĉiela kort'.

Post kiam estis mi vidanta
 Savonton de l'homaro mem,
 De supre, kiel sun' brilanta
 Li ĉiujn instigas al ĝojem'.

- 1015 Lumigas tiu suno bela
 Blindecon de l'idolanar'
 Jakoba dom', land' Izraela,
 Firmiĝas pro ĝia radiar'.

GYSBREGHT.

- Ke Dio gardu vin. Ĉu kanti nun konvenas?
 1020 La malamikoj tuj la monaĥejon prenas.

1) Komparu la noton 4) sur paĝo 5.

2) *Hendrik van Vianden, Willem van Mechelen* (elp. Vilem van Meĥelen), *Jan van Nassau* (elp. Nasaŭ) kaj *Jan van Sierck* (elp. Sirk).

3) Vidu Luko 2, v. 25—35.

- Vin, onklon Gozewyn, maljunan, sen fortec',
 Sur ŝultroj portos mi, en via maljunec'.
 Klaerisse, sekvu min, kuzin', kun via ĥoro,
 Se Dio gvidos nin, aŭ de la sort' favoro.
 1025 Aŭskultu, patro, min. Jam bruas kun terur'
 La malamikoj kaj nin savos urĝo nur.

GOZEWYN.

Fidela nevo, vi tro multajn penojn faras.

KLAERIS.

Rezigne ĉiuj ni jam antaŭ morto staras.

GYSBREGHT.

- Do Dio savis min el akvo kaj brulad',
 1030 El multaj glavoj kaj el akraj lanc' kaj spad',
 Ke vidu ĉe l'altar' mi l'episkopon morti,
 La monaĥinojn en la varma sang' perforti?
 Ho, Dia gento, mi ne povas kredi ĝin!
 Aperis dum la nokt' Mahteld' al la edzin'
 1035 Kaj savi ambaŭ vin al mi ordonis voĉo;
 Fantom' ĉirkaŭas vin kaj kvazaŭ kun riproĉo.
 Ne prenu ŝarĝon de mortig' sur la anim'.
 La trupoj estas en de l'monaĥej' proksim';
 Atak' unua la pordegon jam detruos.
 1040 Sur tiu sankta ter' la ĉasta sango fluos.
 Soldatoj venas, ĉar mi aŭdas bruon jam.
 Mi vin petegas pro de l'Krucumito am',
 Por ni mortinta ĉe Ciono en doloro,
 Pro Liaj vundoj de piedoj, manoj, koro
 1045 Kaj pro la dorna kron', de l'kapo premeĝint',
 Pro la en Lia flank' puŝita lancopint',
 Permesu, ke de vi mi la savanto estu:
 En tiu ĉi mizer', ho patro, ke mi restu

- Senkulpa pro de vi kaj viaj sanga mort'.
 1050 Nur tion volas mi, se vin insista vort',
 Nek akraj larmoj, nek petegoj ŝanĝi povos:
 En Di' kaj sanktular' mi atestantojn trovos
 Ke ne malhelpus min teruro nek danĝer'
 De l'morto savi vin el tiu ĉi mizer'.

GOZEWYN.

- 1055 Por ni vi faris pli ol estis via devo;
 Ni antaŭ Dio ĝin memoros, pia nevo.
 Al Dio en ĉiel' nur estu la honor',
 Do vi ekstaru kaj ne genufleksu por
 Mortemaj homoj, ĉar malĝusta tio estas.
 1060 Post longa vivo ne pli bela morto restas
 Ol verŝi tie ĉi la sangon de martir'
 En tiu sankta lok' laŭ mia kordezir',
 Dum tago, kiam ni naskiĝon Dian festas.
 La morto venu. Mi purkonsciencia estas.
 1065 Min longe tiris de l'animoj ripozej';
 Post kiam oni min forpelis de l'sidej'
 Kaj Utrecht¹⁾, iam pro infana am' fidela
 Sin turnis for de mi en ribelem' malbela:
 De tiam mankis jam por vivi la volem'.

GYSBREGHT.

- 1070 Mi suprenkuras. Jen la malamikoj mem.
 De l'monaĥejo mi pordegon ŝirmi penos
 Kaj kontraŭ morto mi laŭ povo vin subtenos.

BADELOCH, AREND VAN AEMSTEL.

BADELOCH.

Sinjoro frato, vi revenas sola, ve?
 Ho, Dio, mia edz', ĉu li pereis?

1) Utrecht, elp. Ŭtreĥt.

AREND.

Ne.

BADELOCH.

1075 Ho diru, ĉu li sin de l'morto savi povis.

AREND.

Mi tute sanan lin ĉe la urbdomo trovis.

BADELOCH.

Ve, kie estas li, konsolo kaj esper' ?
Kaj vi promesis lin ne lasi en danĝer'.

AREND.

Ne ĉagreniĝu, ĉar tre baldaŭ li revenos.

BADELOCH.

1080 Ĝi daŭras longe jam. Ho, se li nur eltenos,
Sendirektila ŝip', sur maro en danĝer'.
Sed nun informu min pri ĉio ĉi laŭ ver'.

AREND.

Postulo grava. Ĝi min ree terurigas;
La kordoloron ĝi ĉagrene renovigas.

1085 Neniu aŭdos ja, sen larmoj en okul'
Pri tiu tragedi'. Eĉ ne la senhontul' ¹⁾
Bastarda povus ĝin, nek Grobber ²⁾ mem toleri:
Ĝi ree igas min pro freŝa vund' suferi.
Cetere restas ni en mezo de l'danĝer',
1090 Atendas baton de pli granda eĉ mizer',

1) La bastarda senhontulo estas *Witte van Haemstede* (elp. Vite van Hamstede), bastarda filo de *Floris V*. Li estas historia persono, sed lia karaktero ne estis tiel abomena, kia *Vondel* prezentas ĝin.

2) *Grobber*, elp. Ĥrober.

- Se Dio de la venĝ' nun ne la vojon baros;
 Sed, ĉar vi volas ĝin, mi la rakonton faros.
 Apenaŭ venis ni sur placo Middeldam,
 Jen burĝoj, tie ĉi estantaj, diris jam:
- 1095 La malamikoj la urbflankon novan prenis,
 Dum kontraŭstari la popolo vane penis.
 Do Gysbreght sendis tuj sciigon kun ordon'
 Bruligi pontojn al la dua urbduson',
 Kaj sur la Middeldam precipe sin firmigi,
- 1100 Por la transiron de la trupoj malebligis,
 Lasante al arme' la novan flankon por
 Danĝeron teni de l'malnova urbo for.
 Li antaŭiris mem kaj al kuraĝ' inspiris,
 Kun ni al urbodom' kaj vendoplaco iris.
- 1105 La burĝojn ĉie li kunigis kun fervor';
 Kaj ili serĉis tuj materialon por
 Sin ŝirmi de surpriz'; per ĉen' la vojon baris,
 El kestoj, ŝrankoj kaj el sakoj baron faris,
 Per ĉio, kio al la man' prezentis sin;
- 1110 Kaj tiam al la fajr' ni kure sekvis lin,
 Por fari ordon en ĉi tio, se ni povus.
 Sed tro malfrue jam. La vortojn mi ne trovus
 Por diri, kiel nin ĉagrenis la labor',
 Kun kia mortigad' la nokto pasis for.
- 1115 Mortintoj kuŝis sur la kajoj kaj en stratoj;
 Ĉe ĉiu vojokruc' kunvenis la soldatoj.
 Konsterno regas ja kaj ĉie aŭdas vi
 La sonojn de mortig', brulad' kaj agoni'.
 Antikva urbo, ĝi militojn glore finis; 1)
- 1120 Por ĝiaj ŝipoj sin river' kaj maro klinis,
 Potenca por fremdul' kaj por najbara ŝtat',
 Ĝi neniigas nun per unu sola bat'.

1) En tiuj ĉi linioj *Vondel* donas bildon pri Amsterdam laŭ la stato en kiu ĝi estis dum lia propra tempo.

- Sed malgraŭ ĉio nin instigis malespero,
Ĝi kostis vivon al grafanoj el Kermero.
- 1125 La Amsterdama sang' ne sola mortas ĝi,
Kaj la kadavroj jam multiĝas pli kaj pli,
Kun la vizaĝoj al la tero aŭ ĉielo.
La kono de la voj' en de la luno helo
En tiu urbkvartal', tra stratoj, trans pontar',
- 1130 Al ni utilis por rebato de l'trupar'.
Kaj ili ofte sin retiris en malordo
Kaj malfermiĝis jen fenestro kaj jen pordo.
Ni plinombriĝis kaj daŭrigis kun bravec'
Por la pordegon de Harlemono, se eblec'
- 1135 Permesus, bari per kadavroj de mortintoj
Por la rebato de l'en urbo envenintoj.
Sed tro malfrue. La savita gardistar'
Nin jam informis, ke envenis rajdistar'
Kun parto de l'arme': ne helpis kontraŭstari,
- 1140 Eĉ ne la vojon per levitaj pontoj bari.
Ĝi ne efikis. Jam vastiĝis la brulad'.
Prudento estis for en granda konsternad'.
Jen Willem¹⁾, mia frat', la monaĥestro, venis.
Li la restaĵon de la krucifikso tenis:
- 1145 „Preĝejon riĉan vi protektu, de Katrijn²⁾
Kaj Dipatrino mem. Ho, helpu al Kristijn,³⁾
Fratin' de Gysbreght". Li nur pene sin aŭdigis.
„En la ĥorejon mi, tremantan, ŝin kaŝigis
Kaj pene iĝis for. Aŭdiĝas la gigant',
- 1150 Per puŝotraboj al la pordo atakant'.
Dum Dia festo la preĝejon liberigu!"
Ni kuris, por ke ni danĝeron malebligu,

1) *Willem*, elp. Vilem.

2) Aludas pri la nuna Nova Preĝejo, dediĉita al la Sankta Dipatrino kaj al Sankta Katarino (*Katrijn*, elp. Katrejn).

3) *Kristijn* (elp. Kristejn), fratino de *Gysbreght* laŭ la fantazio de *Vondel*.

- Samkiel ursoj dum la nokto, pro malsat'
 Avidaj je kaptaĵ. Ni inter glavobat'
- 1155 Kaj fajro ĵetis nin, por Dio ĝin riskante,
 Sed pardon de l'preĝej' rompitan jam trovante,
 Kriegon aŭdas ni, aŭdeblan trans la strat'
 Kaj tra la tuta urb', por Dio fruntobat'.
 Simile al detru' de l'juda ĉefpreĝejo,
- 1160 Plenigas mortintar' altarojn kun ĥorejo.
 Ho, kio restis sen ofendo aŭ perfort',
 La homoj sur tegment' rifuĝis de la mort',
 Kaj eĉ defendas sin kaj trafas pro eraro
 Per ŝton' kaj ligno nin. Ekploras virinaro,
- 1165 Kaj sur la galeri' infanoj, en terur',
 Kurantaj ĉie ĉi. Sur la altaro nur
 Duono restis de l'kandeloj bruladantaj.
 Preĝejrabistoj, pro kaptaĵo klopodantaj,
 Forŝtelas ĉion kaj batalas inter si.
- 1170 De l'muro ili eĉ la veston de Mari' ¹⁾
 Forŝiras. Oni en glitiga sango iras;
 Kalikojn ili kaj mesvestojn rabakiras,
 Rigidajn pro gemar', pro perloj, ruĝa or',
 Plej brilajn, laŭ kutim', dum tiu festa hor',
- 1175 El ĥoro kaj altar'. Kristnaska nokt' rompiĝis.

BADELOCH.

Kaj vi, kaj pri Kristijn? Ĉu Gysbreght afiktiĝis?

AREND.

- Kaj mi, pripensu. Mi ankoraŭ vidas ĝin.
 De l'ĥoro ili per la haroj trenis ŝin,
 La ĉarmaj brakoj per ŝnuregoj firmligataj.
- 1180 Ho, kiom estis la amantoj ĉagrenataj!

1) La vesto de *Mario* (Marianum) estis brodita, senmanika vesto de la *Mario*-statuo, pendigata dum altaj festoj super tiu statuo.

- Plej multe Heemskerck, pro ekscito en koler',
 Dum al ĉielo ŝi rigardis en mizer'.
- Ni ĉiuj sekvis lin kaj firme kune tenis
 Kaj liberigis ŝin perforte. Tiam venis
- 1185 Gelranoj ¹⁾, Frizoj kun la homoj el Kermer'
 Kaj el Zelando, pro la bruo en koler'
 Kaj pro la virgulin'. De l'grafo filoj tie
 Vidiĝis. Egmond mem kaj Dideriko ²⁾ ĉie
 Kun Grobber, inferul', plej brave montris sin.
- 1190 Dumvintre tiel la venteg' renkontas vin
 Kaj muĝadante ĝi neniel trankviliĝas.
 Pro akvopremo eĉ per ĝi endanĝeriĝas
 La digoj. Kreskis tro de l'malamikoj trup'
 Kaj devis cedi la preĝejon nia grup',
- 1195 Reiri al la Dam, por ĉerpi novan forton,
 Ĉe la ĥorejo jam kuz' Heemskerck trovis morton,
 Heroa kavalir', honor' de l'famili';
 Polaenen ³⁾ ankaŭ, dum lin provis helpi li.
 Neniu laŭ kuraĝ', nek justo lin similis,
- 1200 Kaj same ankaŭ Kuick ⁴⁾. Ne virto plu utilis,
 Ne la preposton pli la kruco ŝirmis ol
 Kvadrata mitro lin protektis kaj la stol',
 Ne helpis la piec' la pastron de Jesuo,
 Ĉar frato Willem, vin mortigis sangelfluo
- 1205 Kaj ĉe de l'ĉefaltar' pied' faligis vin.

BADELOCH.

Ho kiom da mizer'! Ĝi tre ĉagrenas min!

1) Gelranoj, loĝantoj de Gelre, la nuna provinco Gelderland (elp. Helderlant), iama duklando. Verdire la Gelranoj ne miksis sin en la holandaj malpacoj.

2) *Dideriko, Diedrick van Haerlem.*

3) *Polaenen*, elp. Polanen, alia nomo por *Polaen*, vidu linion 888.

4) *Kuick*, elp. Kōjk.

Mi tamen petas, ke rakonti vi daŭrigos.
 Ne plaĉas la komenc'. La fino min timigos.
 Ho, kiel de l'parenc' la edzo iĝis for?

AREND.

- 1210 Ne estis malkuraĝ', nek tim' en lia kor'.
 Li penis sur la Dam sin teni kun efiko,
 Ĉar tie puŝis sin per fort' la malamiko,
 Samkiel kontraŭ kluz' sin ĵetas akvoflu'
 Kaj terurigas nin per surdiganta bru'.
- 1215 De l'kluzo pordoj al la premo kontraŭstaras
 De l'akvo dum moment', ĝis kiam ilin faras
 Dissalti la flueg', liberigante sin.
 Ĝi disvastiĝas kaj renversas en la fin'
 La arbojn, domojn kaj la landon subakvigas
- 1220 Per maro, kiu sin per nova bord' limigas.
 Simile oni sin defendis sur la Dam
 Dum tuta horo eĉ, ĝis kiam alta flam'
 Sur la tegmento de l'preĝejo ekvidiĝis
 Kaj la majesta dom' en hela lum' bruliĝis.
- 1225 Vekriis homo kaj infan' en malesper',
 Pro l'fajro ĵetis sin de supre al la ter'
 Aŭ en la lancojn. La aliaj, ĝin vidante,
 Kuraĝon perdis. Per benita torĉ' ĵetante,
 La fajron faris la infera Grobber, li,
- 1230 Pri kies vivo eĉ ĝis nun suferas Di'.
 Nun ĉiu por si mem nur je forkuro fidu.
 La frato kriis: mi al la kastel' rapidu
 Kaj zorgon havu por infanoj kaj edzin'.
 Li en la urbodom' ĝis fino tenis sin.
- 1235 Mi nun alkuras por defendo de l'kastelo,
 Kaj mian fraton do protektu la ĉielo!

BADELOCH.

Espero sen esper'. Ah, Gysbreght, ho sinjor'!
Li certe mortis kaj por ĉiam estas for.

ĤORO DE BURĜOJ, BADELOCH.

ĤORO DE BURĜOJ.

- 1240 Nenie fidelec'
Pli ol en geedzec'
Sincere korojn ligas.
Animojn kiel arda fer'
Forgitajn kune, ne disigas
Ĝoj' nek mizer'.
- 1245 Al koro de l'patrin'
Per sango ligas sin
Ĉe ŝia Brust' nutrita
Infan', naskita en dolor',
De ŝi dum longa temp' portita
1250 Sub ŝia kor'.
- Pli forte ligas sin
La edzo kaj edzin',
Nedisigebla paro,
Vivintaj ĉaste inter si,
1255 En paco kaj dum jar' post jaro
En harmoni'.
- Se tia estas am',
Animojn tiu flam'
Kaj korojn kunfandigas,
1260 Pli forta estas ol la mort',
Al Dia am' sin proksimigas
Pro sia fort'.

Kaj tiu ĉi fajrer',
 Plej nobla sur la ter',
 1265 Neniĉ estingiĝas,
 Cement' plej forta de l'natur',
 Ĝi ligas korojn se rompiĝas
 Eĉ ŝtona mur'.

Pro tia am' turtin' 1)
 1270 Dolore sentas sin
 De l'turto seniĝinta,
 Plorplendas pri kruela sort'
 Sur branĉ' de arbo sekiĝinta
 Ĝis sia mort'.

1275 Nun ploras la edzin'
 De Aemstel, banas sin
 En larmoj malespere.
 Ŝi kredas Gysbreght morta do,
 Ĉar pro burĝar' kaj urb' li vere
 1280 Sin riskas tro.

Ho Di', kompatu ŝin,
 Ke ŝi akceptu lin
 En sia domo ĝoje,
 Ĉar ŝi atendas en esper'
 1285 Kaj tim', ĉu venos li refoje
 El la danĝer'.

BADELOCH.

Jen bruo, ĉe l'pordeg', kaj voĉ' aŭdigas sin.
 La edzo, dank' al Di', mi jam rekonas lin!

1) Aludo pri la legenda fideleco de la turtino, kiu post la morto de sia kunulo neniam sidiĝas sur verda branĉo.

K V I N A A K T O.

GYSBREGHT VAN AEMSTEL, BADELOCH, KURIERO.

GYSBREGHT.

Pro kio, karulin', la larmoj kaj la ploroj?

BADELOCH.

1290 Ĉar vi saviĝis, jam forpasis la doloroj:
Fidela edzo, vi, konsolo kaj trezor',
Ĉar vi saviĝis nun, jam estas sen valor'
La urb', la tuta mond'! Sed kiel vi alvenis?

GYSBREGHT.

Post kiam do la Dam ¹⁾ la malamiko prenis,
1295 Mi kun la resto al urbdom' retiris min
Kaj kiel akvon dig' kun fort' detenis lin.
Simile kampular', dumnokte alarmata,
Per herbo helpas sin, per ĉio alportata:
Palisojn, ŝtonojn kaj kusenojn uzas por
1300 Subteno de l'mardig' kaj ŝvitas pro labor'.
Ĉagrene la gigant' teruran bruon faris,
Li kiel alta tur' per kap' kaj kol' elstaris,
Pli alte ol la kap' de ĉiu ĉirkaŭant',
Per rostro en la rond' blovanta elefant'.
1305 Li kvazaŭ maston en la manoj lancon tenis,
Kaj pli facile ol kuniklon homon prenis,
Per unu kruro kaj transkape svingis lin
Kaj la kranion, sur la ŝtonoj rompis ĝin.
Li trans kanalon per bastono salti povas,
1310 La forton sur riglil' de l'ŝtalaj klingoj provas.

¹⁾ La Dam estas ankoraŭ nuntempe la ĉefplaco de Amsterdam.

- Tra fer' per unu bat' li hakas kaj tra ŝtal',
 Kranion provas sur pordegoj el metal'.
 Li ŝajnis Polifem' ¹⁾, ŝafaro la soldatoj,
 Moviĝis turo de l'urbdom' pro liaj batoj
- 1315 Sur fosto kaj fasad'. Timiĝis nek baston'
 De Herkuleso lin, nek pugnoj de Ŝimŝon'.
 Al li la Kermeran' kaj Nordlandan' aliĝas,
 La murrompilo kaj ŝtuparoj jam pretiĝas:
 Jen ili grimpas kun la mano al fasad',
- 1320 Sub ŝildo por de l'kap' kaj kolo protektad'
 Kaj ŝirmo de pluveg' de ligno, sagoj, ŝtonoj.
 Kaj nia junular' per fosto kaj kolonoj,
 Per kverkaj traboj kaj valora artlignaĵ',
 Per artobjektoj kaj antikva ornamaĵ'
- 1325 Surŝutas ilin kaj eĉ kvankam senespera,
 La vivon lasos nur post kontraŭstar' severa,
 Por la urbestrojn kun la urbkonsilantar' ²⁾
 Defendi laŭ la ĵur', farita al estrar'.
 La urbestraron eĉ kuragon oni vidas
- 1330 Redoni al popol'; escepte kiuj sidas
 Duonvestite kaj nudkape sen defend',
 Pro alta aĝo kaj malforto en atend',
 Ĝis kiam ili la honestan morton trovas:
 Batalas per la kor', la manoj ne plu povas.
- 1335 Malsupre burĝoj per pikil' kaj halebard'
 La pordon tenas kun la mur' en sia gard'.
 Mi super la tegment' de l'urbodom' suriris
 La turon, kie la vidaĵon vi akiris
 De l'tendoj ĉe la urb', de l'loko de l'arme'
- 1340 Kaj oni vidis ĝis la Dom de Utrecht ³⁾, se

1) *Polifemo*, la ciklopo, kies okulo estis elpikata de *Uliso*.

2) Urbestroj kaj urbkonsilantaro — evidente *Vondel* tie ĉi pensis pri sia propra tempo.

3) La *Dom* de Utrecht estas la ankoraŭ nun ekzistanta plej alta turo en Nederlando.

- Klariĝis la veter'. Mi vidis la luktadon,
 Per murrompilo al pordego atakadon,
 Per bat' post bato sub protekta ŝirmileg'
 El multaj ŝildoj. Jam ekkrakas la pordeg'.
- 1345 Ni senprokraste per hakiloj ekatakis
 Kaj ĉiujn fostojn kaj kolonojn tuj dishakis;
 La tutan ilon for de supre puŝis ni,
 Ke sur la plac' kun bru' kaj polvo falis ĝi,
 Teruran truon en la feraj kapoj faris;
- 1350 Sed tuj laŭorde ĝin aliaj vicoj baris.
 Dumtempe ĉe l'preĝej' ekbrulis domoj jam,
 Ardeztegmenton de l'urbdomo nun la flam'
 Atingis; pro la fam' blindiĝis la okuloj.
 La pordo cedis jam al la furiozuloj:
- 1355 Mi mute staris, sen amikoj vidis min.

BADELOCH.

Kaj vi ne pensis pri infanoj kaj edzin'?

GYSBREGHT.

- En tiu embaras' nubeto elĉiela
 Aperis antaŭ mi kun Dia brilo hela.
 Mi aŭdis voĉon el ĉi tiu hela nub';
- 1360 Mi klare vidis kaj mi aŭdis ĝin sen dub':
 Ĉu Gysbreght pri kuzin' Klaerisse ne atentis,
 Pro onklo Gozewyn, grizul', kompaton sentas?
 Jam estas en danĝer' infanoj kaj edzin'.
 Mi teruriĝis kaj de tie savis min.
- 1365 Sekreta koridor' kondukis min al kelo,
 La sanktan lumon mi adoris. Ĝia helo
 Al strat' kaj abatej' danĝere gvidis min.
 Sed mian vokon eĉ neniu aŭdis ĝin,
 Ĉar kontraŭstarus mi sentime la fatalon,
- 1370 Daŭrigus sur tegment', ekstreme, la batalon.

- Mi venis supre, sed jam falis la pordeg',
 Do al boato mi deglitis per ŝnureg',
 Ĵus post la monaĥej' kaj trans la Aemstel iris,
 En senfolia arb' min tie suprentiris.
- 1375 La abatejon mi observis; pro aŭskult'
 Atenta ŝajne min atingis la tumult'.
 Kaj rigardante en teruro la aferojn,
 Mi vidis fumon kaj post tio la fajrerojn.
 Jen de la Doelenpont' ¹⁾ aŭdiĝis la trotad'
- 1380 De rajdistaro. Mi ne emis al restad'.
 La ponton oni pro malzorgo ne detruis.
 Mi do alkuris por pacigi kiuj bruis,
 Por brave kontraŭ la rajdistoj teni sin.
 La ponton petis mi post mi disrompi ĝin,
- 1385 Aŭ ĝin bruligi, sed ja mankis kuraĝulo.
 Vidiĝis dume de l'malnova urbo brulo,
 Per kiu katastrof' sin antaŭsignis jam
 La posta okazaĵ' sur placo Middeldam.
 Do mi rezignis kaj la tutan urbon lasis,
- 1390 Avertis ĉiujn kaj al la kastelo pasis
 Kaj malriĉuloj kaj riĉuloj sekvis min:
 Mizera homamas' ĉi tien savas sin.

KURIERO.

Ho, mortis episkop' kaj lia abatino!
 Aĥ, patro Gozewyn! Klaerisse, ĉastulino!

GYSBREGHT.

1395 Ho, kiel estas, ke vi povis vidi ĝin?

KURIERO.

Ĉu vi permesas, ke mi nun respondu vin?

1) Doelenponto, elp. Dulenponto. Tiu ponto verŝajne ne ekzistis en 1304 kaj certe tiam ne havis tiun nomon.

- Vi vidis Borselen, de Heemskerck mortigitan; ¹⁾
 Mi trovis en angul' ĥoreja lin sternitan.
 Mi en de l'malamik' vicaro kaŝis min,
 1400 Ĉar tro malforta, vi retiris tiam vin.
 Tuj, kiam la preĝej' pro l'fajr' lasita estis,
 Mi senarmigis la mortinton kaj min vestis
 Per lia kasko kun la plumoj, per la spad'
 Kaj la kiraso por sekreta observad'
- 1405 De l'malamikoj. Do en la monaĥinejon
 Mi sekvis Haemstee ²⁾ kaj enkuris la preĝejon
 Kaj trovis Gozewyn, ankoraŭ sur la seĝ',
 Kun lia sekvantar' en plej fervora preĝ'.
 Per firma kredo nur je Dio ili fidis
- 1410 Kaj netuŝate de l'bataltumulto sidis.
 Li ŝajnis suno kaj la klara luno ŝi,
 Kun ĝoja steletar' en rondo ĉirkaŭ si;
 Kaj tiuj ilin du, de l'brilo fonton, gloris;
 La piaj lipoj nur silente preĝadoris.
- 1415 Sed Haemstee jam al li, kun brako, ĵetas sin,
 Ruĝmakulita pro la sango de Kristin',
 Je l'barbo kaptas lin per unu man', tenante
 La sangan glavon en la dua. Sin levante,
 Similis ĉiu, eĉ plej dolĉa, monaĥin'
- 1420 Al furioza kaj muĝanta leonin',
 Ŝirmanta neston pro de la ĉasist' rabemo.
 Jen vera fidelec' kaj nobla koleremo.
 Jen ili luktis. Kaj Klaerisse tenis sin,
 Kun sia sekvantar' kaj ĉirkaŭbrakis lin.
- 1425 La pian kapon, ĉu ĝin iu tuŝi povus,
 Se ĝin post muro de Difianĉinoj trovus,

1) *Borselen*, elp. Borselen, alia ortografio por *Borsslen* (vidu linion 480).

2) *Haemstee*, elp. Hamste, *Witte van Haemstede*, komparu la noton 1) sur paĝo 47.

- Ĉirkaŭbrakantaj sin? Ho, purkristana sfer'!
 Jen ĉiuj virtoj mem, Am', Kredo kaj Esper',
 Kun sia fratinar', Malvirton batalante,
- 1430 Per kruco kaj sufer' komuna jam venkante.
 La malamiko en konfuz' retenis sin,
 Sed vido de Klaeris al venĝ' instigis lin
 Kaj memorigis pri de l'patro mort' kruela
 Kaj ke devenis ŝi de Velzen malfidela.
- 1435 En febrekscito li avidis al la sang'
 De Aemstel kaj de ŝi; per ruĝmakula stang'
 Li tra la brusto de la monaĥinoj puŝis.
 Jen unu apud la alia ili kuŝis,
 En rondo kvazaŭ en ruĝblanka rozoĉen'
- 1440 Kaj apud Gozewyn Klaerisse staris sen
 Protekto homa. Jen fiere ambaŭ restis,
 Sur trunko floroj en florbedo, kiu estis
 Droninta en la sang'. Aŭdiĝis ĝemo nur,
 Aŭ movis kapo sin aŭ brako kaj jen krur'.
- 1445 Aliaj, ili jam la lastan spiron blovis.
 La episkopo ĉe de l'vivo fin' sin trovis,
 Sed sin ne regis pro kolero kaj dolor':
 „Virinon tuŝis ja la patro sen honor',
 Sed ne kulpigis pro virina sang' verŝita,
- 1450 Do fakte estas vi bastardo finaskita,
 Laŭ korpo kaj spirit'. Jen via vera stat',
 Eĉ monaĥinojn ne ŝparante de mortbat''.
 „Bastarda episkop'',¹⁾ fariĝis la respondo,
 „La piajn vicojn vi forĝvidos el la mondo.
- 1455 Obstina, metu for la falsan mitron nun'',
 Parolis la bastard' kaj lin renversis kun

1) Bastarda episkopo — tiel *Haemstede* insulte nomis *Gozewyn*, ĉar tiu ĉi, kvankam senigita de la episkopa rango, ankoraŭ kuraĝis ornamĝi sin per la signoj de sia antaŭa ofico. Vidu la noton 4) sur paĝo 5.

- La seĝo en la sang': la mitro falis same,
 Klaerisse ankaŭ, ĉar ŝi provis teni ame
 Lin firme ĉe la kol' kaj ĉirkaŭbrakis lin.
 1460 En alabastron kun purpur' ŝi ŝanĝis sin.
 Ĝis ortenilo li la sangan glavon puŝis
 En flankon de l'grizul'. Simile iam kuŝis
 Virbovo blanka ĉe la blinda paganar',
 Kun distranĉita gorg' ĉe l'fajro de l'altar';
 1465 La kornojn kovris or', la lumbojn flordrapiro.

GYSBREGHT.

Kaj kion pri Klaeris?

KURIERO.

- Ŝi helpis por eltiro
 De l'spado el la vund', prenante mitron, ĝin
 Remetis kaj sur buŝ' mortpala kisis lin.
 Okulojn je duon' malfermis li dolore
 1470 Sin rerigardas kaj kompatas ŝajne kore.
 Kaj ilin fermas ŝi dum lia lasta ĝem'.
 Forflugas la spirit'. En tiu ĉi subprem'
 Ŝi svenas por moment'. Sed antaŭ ol revenis
 Konscio, Haemstee ŝin sur la kadavron trenis
 1475 Kaj uzis por al Di' ofenda senhontaj'.
 Ŝi konsciigas en la fin' pri l'friponaj'
 Kaj vokas: „vidu nun, Sinjor', de l'fianĉino
 Suferon kun hontig'. Maria, virgulino!
 Kaj Klaro, vidu min, Mahteldo, ho patrin'''.
 1480 Pro ŝia plendo la fripon' ne ĝenas sin
 Pli ol la grifo pro de l'kolombet' pepado,
 De ĝi kaptita per ungegoj, dumflugado.
 „Nun plendu al patrin''', li diras, „pri dolor''',
 Sin piedfrapas sur la ventro kaj la kor',

- 1485 Ke tra la nazo kaj la buŝo sang' eliĝis
 Kaj la okuloj, la ĉielaj, nun fermiĝis
 Kaj ŝi ekdormis en de l'pastro ĉirkaŭpren'.

BADELOCH.

- Pro tia vekriad', ĉu Dio restas sen
 Kompat' por la anar', aŭ ĉu al malboneco
 1490 Li volas helpi eĉ per ĝia senpuneco?

GYSBREGHT.

Ĉu kontentiĝis do venĝemo kaj malam'
 Kaj ĉesis la perfort'?

KURIERO.

- Ĝi ne finiĝis jam.
 En alabastra tomb', proksime de l'altaro,
 Kun riĉa ornamaĵ', ripozis la ostaro
 1495 Valora kaj restaĵ' de iu sankta vir',
 De sia firma kred' al Dio la martir'.
 Je tio la fripon' malica venĝon volas.
 Ho, ke silentas Di', mortintoj ne parolas.
 Per sangmakula man' al ĝi li ĵetis sin
 1500 Kaj, trokuraĝe, li perforte romp'is ĝin.
 Jen, tuj renkontis lin agrabla bonodoro,
 Sed ne moviĝis de la malnoblul' la koro.
 Li jam daŭrigas per disjeto de l'ostar',
 Per rompo de la tomb', de l'sankta ĉefaltar'.
 1505 Li de la monaĥej' tegmenton tuj bruligas.
 La fajro venkas, la rabantojn reirigas.
 Mi venis al la Bors', ĉeborda konstruaĵ', ¹⁾
 En flamoj nun kaj jen, arĝento kaj oraj',
 Rabita sanktajar', tapiŝoj kaj pentraĵoj,
 1510 En ĉiu galeri' velur' kaj skarлатаĵoj

1) Anakronismo de *Vondel*. La unua Borso de Amsterdam estis konstruata en 1608.

- Jam kuŝas tie ĉi kaj Grobber gardas ĝin.
 La flamoj en la or' dum nokt' spegulis sin
 Kaj multaj orfoj kaj vidvinoj ankaŭ estis,
 Plorantaj, kiuj en plej granda timo restis.
- 1515 Sekrete venis mi apude de l'kastel',
 Konfidas vivon nur al vi kaj la Ĉiel'.
 Ekblovas vento kaj ĝi en la flamoj bruas.
 Ceterajn domojn nun la fajra mar' detruas,
 Kastelon trafos. Por atak' preparu vin!
 1520 Detruu ponton.

GYSBREGHT.

Jam la frat' preparis sin.

BADELOCH, AREND VAN AEMSTEL, GYSBREGHT
 VAN AEMSTEL, FRATO PETER, RIFUĜINTOJ.

BADELOCH.

- Ho, kion vidos mi? Burgaron repelatan.
 Revenas mia edz'; la fraton tro amatan
 Ĉe la mortintoj li sendube serĉas por
 Lin ne forlasi kaj el la danĝero for
- 1525 Lin porti; estu li vivanta aŭ mortinta.
 Jen oni estas jam la ponton detruinta.
 Sinjoron mian, ve, ho kie trovos mi?

AREND.

Ah, frato, lasu min.

GYSBREGHT.

Do vi?

AREND.

Ne povas pli.

BADELOCH.

Ho, frato Arend.

FRATO PETER.

Vi nun signon doni volu.

AREND.

- 1530 Mi perdis spiron kaj ne eble ke parolu.
 Elsangas mia kor'. La devo gvidis min.
 La patran urbon mi defendis ĝis la fin',
 Post kiam en ekzil' vagigis min la sorto.
 Adiaŭ frato, sed vi prenu post la morto
- 1535 Kadavron mian, se de l'loko iros for,
 Kun vi kaj metu ĝin en sanktan teron por
 Ke ĝin ne la venĝem' soldata malhonoru.
 Ho, pastro, en preĝad' pri la anim' memoru.
 Mi svenas, mortas. Jen de mia tempo fin'.
- 1540 Amikoj, preĝu vi, ke Di' akceptu min.

FRATO PETER.

Li mortis, estas jam ĉe Dio en favoro.

GYSBREGHT.

Li mortis en kiras' en sia plena gloro
 Kaj sekvas fraton Ot¹⁾, estiĝis ĉielan',
 Triumfas apud Di'.

BADELOCH.

For via dekstra man'.

RIFUGINTOJ.

- 1545 Li ne plu en atak' estonte partoprenos,
 Kastelon de Vreland', nek tiun ĉi subtenos, ²⁾

1) Komparu la noton 2) sur paĝo 6.

2) Komparu la noton 5) sur paĝo 5. *Arend van Aemstel* defendis la kastelon Vreland kontraŭ la grafo kaj la episkopo.

Nek rajton ŝirmos de la urbo en batal',
 Aŭ trotos antaŭ la armeo sur ĉeval'
 Kaj gloron en la polv' per sang' kaj ŝvit' akiros.

GYSBREGHT.

1550 La korpon portu for, la vestojn vi eltiros.

SINJORO VAN VOOREN KUN TRUMPETISTO,
 GYSBREGHT VAN AEMSTEL.

VOOREN.

Sinjur', pro via sort' ni tre kompatas vin.
 Ni ĉe l'fosaĵo por atak' preparis nin.
 Jam urĝas, ke vi tuj decidon konsideru;
 La domon cedu kaj nur je indulg' esperu.
 1555 Vin ŝirmu de malben'. De Egmond jen postul',
 En nomo de la graf'.

GYSBREGHT.

Mi estus senhontul'.
 Ne estas ja decid' pri mia propra sorto
 Kaj multaj falos eĉ jam antaŭ mia morto.

VOOREN.

Ĉu estas por hero' trorisko ja honor'?

GYSBREGHT.

1560 Ja restas la esper'.

VOOREN.

Ĝi tute estas for.
 Per via persistem' vi ne atingos multon.

GYSBREGHT.

Ni ja batalos kaj ni vidos la rezulton.

VOOREN.

Utilus la batal', se vian urbon ne
 Kun muroj kaj pordeg' okupus la arme';
 1565 Dum pro la fajro kaj mortigo sonorado
 Kaj de la burĝoj kaj soldatoj klopodado.
 Ĉar tiuj ĉesis nun, forbrulis la urbdom',
 Kaj falis ĉiu en kiras' brilinta hom',
 Pro kio domon kaj kastelon vi defendu.
 1570 Decidu tuj por ke pardonon vi atendu.

GYSBREGHT.

Ne estas peti pri pardon' por mi kutim'.

VOOREN.

Vi estos saĝa se vi pasos el la lim'
 De la kutimoj nun kaj vidos la danĝeron.
 Pli bonan nun el du elektu la aferon.

GYSBREGHT.

1575 Espero restas kaj mi fidas nur al Di'.

VOOREN.

Sed kia do esper'? Kastelon vidos vi
 El ĉiuj flankoj per ŝtuparoj atakatan.

GYSBREGHT.

Vi trovos ĉe la IJ la vojon ja baratan.
 Ankoraŭ estas en la lando amikar'.
 1580 Post Dio fidas mi la flankon de la mar'.

VOOREN.

Ne kredu, ke per vort' mi vin timigi penos,
 El tiu flanko vi ja vidos, kiu venos,

- Kun ŝipoj, antaŭ ol lumigos vin la sun'.
 Disponas admiral' Persijn pri veloj nun ¹⁾
 1585 Kaj ĉiu remilar' de Friz- kaj Vaterlando
 Kaj kolektiĝas en la ĉirkaŭaĵo bando,
 Al fajro iras de l'preĝejo kaj de l'tur'.
 Ĉu kontraŭ tia fort' valorus trupo nur
 De kelkaj homoj, en la urbo detruita,
 1590 Pro la teruro kaj malvenkoj timigita?
 Vi, certe, de l'kastel' ja ekatakis nin,
 Sed, senefike, ĉar ni tuj rebatis vin
 Kaj al la domo vi kun sanga kap' revenis,
 Timante, ke ni jam la enirejon tenis.

GYSBREGHT.

- 1595 Mi ne vundiĝis kaj ne trafis min malbon',
 Nur sangmakulo pro al brust' ĵetita ŝton';
 Ĝi haŭton ŝiris, sed apenaŭ karnon tuŝis
 Kaj pli ol timo nin la propra volo puŝis.

VOOREN.

Sen venko estas ja batalo vana ŝajn'.

GYSBREGHT.

- 1600 Sufiĉa estas por soldato tempogajn'.

VOOREN.

Prefere al perfort', vi faru ja kontrakton.

GYSBREGHT.

Patrin' instruis min, eviti intertrakton

1) *Jan Persijn*, elp. Jan Persejn, sinjoro de Waterland. *Vondel* nomas lin admirallo, ĉar venante de la alia bordo de la IJ, li estis estro de la ŝiparo, ekipita de la Frizoj kaj Vaterlandanoj.

Kun malamiko se ni plej malfidas lin.
Sinjoro, per konsil' vi nun ne servos min.

VOOREN.

- 1605 Heroojn bravajn ja la mastro ŝatas kore,
Se ili pro honor' kaj hejm' batalis glore.
Al li ne plaĉis la troigo de venĝem'
Post mort' de Velzen kaj li ne troigis mem.
Mi bone konas lin, li amas vin sincere.

GYSBREGHT.

- 1610 Renversas ĉion kaj li do min amas vere.
Li male amas min per multekosta am'.
La urbon li per ŝtal' detruis kaj per flam'.
Kaj kiu faris dum la nokt' sovaĝajn batojn?
La Aemstel ŝtopis per mortintoj kaj la stratojn?
1615 Ĝis kien lumas eĉ la brulo de l'domar'?
Ĉu tomboŝtonon aŭ preĝejon kun altar'
Rabistoj ŝparis? Al kapeloj kaj sanktaĵoj
Kaj monaĥinoj ne okazis perfortaĵoj?
Mi eĉ silentu pri torturoj de l'soldat'
1620 Al homoj eĉ en la Didediĉita stat'.
Estontaj tempoj ĝin ja prave abomenos
Kaj Dia severec' ĝusttempe ĝin malbenos.

VOOREN.

- Ho ve, ĉi tiu nokt' pleniĝis per terur',
Sed ke la estrojn vi respondaj farus nur
1625 Pro krimoj en malord' de kiu ajn soldato
Kaj ekster la kontrol' de la aŭtoritato,
Ĝi certe estus ne konforma al raci'.
La sperto estas ja, ke ĝi okazis pli,
Ĉar estis de venĝem' la koro okupita.
1630 Leon' sovaĝa, de l'katen' liberigita,

- Per unu salto, laŭ kruela la natur',
 Unuan de l'amas' ekkaptas blinde nur.
 Se glavo de soldat' kolere elingiĝas,
 Pro peto nek ordon' ĝi baldaŭ reeniĝas,
 1635 Atentas princon nek trupestro. Trovas ĝi
 En malamika sang' bonguston pli kaj pli.
 Se io estas dum taglumo jam hontinda,
 La nokto faras ĝin eĉ pli abomeninda,
 En tia sangavid', blindeco kaj pasi',
 1640 Ŝanĝantaj ĝis fajrer' la lumon de l'raci';
 Ĝi bestojn sen prudent' el pacaj homoj faras.
 Nevole al arme' ni ne tro kontraŭstaras.
 La mastro celis ja de la komenco jam
 Al la okupo de l'rempar' de Amsterdam,
 1645 Sed ĝin detruis ĝis la fundo tiel plene
 Li ne intencis kaj li vidas ĝin ĉagrene.
 Eĉ laŭ milita jur' li ne insistas por
 Ekstrema rajto kaj li punas kun dolor':
 Pli inkliniĝas al pardon' kaj indulgado
 1650 Ol al severa rajt'de l'pinto de la spado.
 La vivon savu kaj per ĝi favoru min.

GYSBREGHT.

Nur estas unu mort' de tuta vivo fin'.
 Foriru, kun propon' simila ne revenu
 Kaj kion sendos Di' per vi, mi ĝin alprenu.

GYSBREGHT VAN AEMSTEL, BADELOCH, FRATO
 PETER, RIFUĜINTOJ, ADELGUND, VEENERICK,
 KURIERO, RAFAEL.

GYSBREGHT.

- 1655 Nun Vooren klare kaj koncize scias ĝin.
 Vi aŭdis, ili por atak' preparis sin:

- Do, ĉar la domon tuj ĉirkaŭos la soldatoj,
 Ja estos bone, ke per ŝipoj kaj boatoj,
 De malantaŭe la senpova famili'
 1660 Foriru. Kun la flor' de l'viroj restos mi,
 Kapable kontraŭ la atakoj nin defendos,
 Se atakpontojn kaj ŝtuparojn ili sendos.
 Do, kara, iru tuj, eĉ malgraŭ la dolor'
 Disiĝa. Petro mem vin akompanos for,
 1665 Kun la infanoj kaj popol' ĝis kiam venos
 Al loko, kie vin neniu homo ĝenos.
 Atendu tie do, ĝis kiam donos Di'
 Reunuigon kun pli bona sort' al ni.

BADELOCH.

- Ve, kio venos nun, kaj kio min atendas?
 1670 Ĉu vi, karulo, al rabist' Persijn min sendas,
 La granda malamik', kaŝobservanta nin,
 En Zwaenenburgh sub flag' de l'graf' tenanta sin? ¹⁾
 Li ne volonte la kastelon fortan cedos,
 Maljustan donon. Do, al kiuj ĝin heredos
 1675 Li volas morton nur, por liberigi sin
 De kiuj ĝenus plu en la posedo lin.

FRATO PETER.

Kuraĝon, sinjorin', mi mem kun vi foriras.

GYSBREGHT.

Adiaŭ do kun kis'.

BADELOCH.

Mi iri ne deziras
 Al ŝipo, ho sinjor' kaj kara edz', sen vi.

1) Komparu la noton 1) sur paĝo 6.

GYSBREGHT.

1680 Mi baldaŭ sekvos vin.

BADELOCH.

Ne certa estas ĝi.

GYSBREGHT.

Ne mankos spaco, eĉ se la haven' ŝtopiĝos
Ŝipet' forvenos ja.

BADELOCH.

Ĉi tie entombiĝos
Vi sub la ruboj kaj ekbrulos tiu dom'.

FRATO PETER.

Senmorta Dio nur ja povas pli ol hom'.

BADELOCH.

1685 Aĥ, se ĉe l'bona Di' kompaton mi nur trovos.

FRATO PETER.

Lin fidu, sinjorin', Li nin protekti povos.
La Siajn gvidas Li tra akvo, fajr' kaj flam'.

BADELOCH.

Pri ĝi atestas la brulanta Amsterdam.

FRATO PETER.

Ĝi estas Lia vol', do kiu intervenos?

BADELOCH.

1690 Do ankaŭ volos Li se io nin ĉagrenos.

GYSBREGHT.

Edzino kara, vi ja trograndigas ĝin.

FRATO PETER.

Ĉagreno kaj konfuz' nun erarigas vin.

RIFUĜINTOJ.

Aŭskultu, sinjorin', konsilon, ni ĝin preĝas.

ADELGUND.

Aĥ, panjo ili tuj la domon eksieĝas.

1695 Ne lasu je virgec', ke ili tuŝu min.

BADELOCH.

Filino, aĥ, ne tro vin ŝirmos la patrin':

Kokino vane la tremantan kovras idon

Por kontraŭstari de l'perfida vulp' insidon.

Li kaptas ambaŭ kaj per plumoj kovras sin

1700 Kaj ŝiras en ekscit' la idon de l'patrin'.

GYSBREGHT.

Ĉu do la morton de l'infanoj vi toleros?

BADELOCH.

Pro unu edzo du infanojn mi oferos.

GYSBREGHT.

Pro tiu eta bub', ĉu ne tuŝigas vi?

BADELOCH.

Tre multe, sed pro edz' ankoraŭ multe pli.

VEENERICK.

1705 Vi ploras, panjo; ĉu pro patro la doloro?

BADELOCH.

Pro patro estas kaj ni ĉiuj mia ploro.

GYSBREGHT.

Ne zorgas panjo se vi estas en dolor'.

BADELOCH.

Dolore naskis mi, lin portis sub la kor';
Sed edzo, koro mem, por mi la vivo estas.
1710 En ĝojo kaj ĉagren' mi apud vi ja restas,
Ĉar fidelecon mi promesis ĝis la mort'.

GYSBREGHT.

Ne malfidelo nin disigus, sed la sort'.

FRATO PETER.

Disiĝu por la bon'. Vi poste rekuniĝos.

BADELOCH.

Se mi foriros, ni neniam revidiĝos.

FRATO PETER.

1715 Li iris ofte kaj revenis sen danĝer'.

BADELOCH.

Neniam iris li en tiom da mizer'.

FRATO PETER.

De l'ŝanco ventmontril' sin turnas tre facile.

BADELOCH.

Ĝi ĉiam turnis sin por mi tre malutile.

FRATO PETER.

Plej bone gvidu la infanojn el danĝer'.

BADELOCH.

1720 Se edzineco min ne ligus estus ver'.

FRATO PETER.

Ne povos helpi nin virino, ŝi nin ĝenos.

BADELOCH.

Do donu glavon, mi batalon partoprenos,
Ke mortu ĉe la flank' de l'edzo la edzin'.

GYSBREGHT.

Vi havas koron de virin'.

BADELOCH.

Do provu ĝin.

- 1725 Jam heroinoj la postenon gardis same,
Kaj urbon kun popol' virinoj savis fame.
Jam montris Baerte, la patrino via, sin ¹⁾
En Ysselsteinkastel' kuraĝa soldatin'. ²⁾

KURIERO.

- Ne surpriziĝu ni, sinjor', mi atentigas.
1730 La triumfantoj nun la rotojn jam ordigas.
Al Frizoj estos de l'atako la honor'.
Preparas ili sin: la tempo pasas for.
Jen ponto por atak', sonoras trumpetado
Kaj urĝas de l'rempar' kaj turoj la gardado.

GYSBRECHT.

- 1735 Sufiĉas la hezit': neceso pelas nin.
Obeu nun al mi, lastfoje kisu min.

BADELOCH.

Volonte, brava, sed mi unu peton diru:
La glavon el la ing' laŭ mia volo tiru.

1) *Baerte*, elp. *Barte*.

2) *Ysselstein*, elp. *Ejselstejn*.

- Min piku tra la Brust' per via propra man'.
- 1740 Pli bone faros vi ol Friz' aŭ Kermeran',
 Post ke mi vidis vin, de vundoj mortigitan,
 Sen kap' la filon, la filinon hontigitan,
 Dum krioj pri mortig' kaj fajr' aŭdigas sin.
 Edzino mortu mi, ne sen infan' vidvin'.
- 1745 Okulojn miajn vi aŭ ili fermi povos,
 Ĉar en de l'vivo lum' ne plu mi ĝuon trovos.

GYSBREGHT.

- Terure, Badeloch, vi tia kredas min?
 Edzinon propran, mi per mia glavo ŝin,
 Honestan al si mem, parencoj kaj infanoj
- 1750 Kaj la popolo, nun per miaj propraj manoj
 Mortigus, kiel nur tirano povus ĝin.
 Mi via edzo plu ne rajtus nomi min.
 Do longan tempon jam malbone vi min konis,
 Mi ne atenton al Kristanaj devoj donis,
- 1755 Ke via pura buŝ' ja povas diri ĝin.
 Aŭ ĉu vi pensas, ke mi nun perfidos vin
 Kaj vian morton sur la konscienco prenos?
 Sed ni defendu nin. La malamikoj venos.
 Sendia bastardul' ¹⁾, nenio movas lin,
- 1760 Pêrfortiginto de Klaerisse, la kuzin',
 Ĉe l'krucifikso kaj altaro, ŝin batinte
 Surventre per pied', pri l'agoni' ridinte,
 Okupos tuj per fort' la domon, igos min
 En sango vidi la infanojn kun edzin'
- 1765 Sufoki. Haemstee en pokalon ĝin verŝigos
 Kaj ĝin varmetan de la patro eltrinkigos,
 Por ke penetru ĝis interne la dolor'
 Kaj antaŭ lia mort' suferu lia kor'.

1) Komparu la noton 1) sur paĝo 47.

- Servistoj, he, gvardi', armilojn prenu, viroj,
 1770 Alportu glavon tuj kun spadoj kaj rapiroj.
 Jam venis lasta tag', pereas la kastel',
 Sed ne sen venĝo, ĉar kun ni al la ĉiel'
 La malamikoj ja kuniros en amaso.
 Rapide sekvu min, por esti en kiraso
 1775 En mezo de l'buĉad'. Min puŝas nova fort'!

BADELOCH.

- Do kien? En fosaj' atendas vin la mort'.
 La ponto brulas. Se decido via restas,
 Kunprenu nin kun vi. Jen viaj idoj estas,
 Senkulpa Veenerick kaj Adelgund, knabin'.
 1780 Stariĝas haroj kaj terur' sufokas min.
 Aĥ, kulpa estas mi, ne estu en kolero,
 Mi enŝipiĝas. La dekanon mi sur tero
 Kaj akvo sekvos: li min gvidu al la bord'
 Sovaĝa de Irland' aŭ al la land' de l'Nord'.
 1785 Danĝeron timas mi ne plu, nek fremdlandanojn.
 Adiaŭ, kisas mi lastfoje viajn manojn,
 Obeas laŭ la dev' de vera Kristanin'.
 Mi plendas vane. Aĥ, protektu, viroj, lin!

RIFUĜINTOJ.

- Kompatu ŝin, sinjor', edzinon en ĉagreno,
 1790 Ŝi jam obeas, sed ŝin kaptas mortosveno.

ADELGUND.

Ŝi mortas, patro, aĥ. Ve, kio trafas min!

RIFUĜINTOJ.

Vi trankviliĝu se vi volas ŝpari ŝin.

FRATO PETER.

Je Dio, aŭdu. Ĝi nur estas korinklino.

GYSBREGHT.

- Ho, kia malsaĝaj', kaj kiom da obstino!
 1795 Vekrioj nek plendad' ne helpos tie ĉi,
 Ne ploru larmojn, ĉar la kruelecon ni
 Rebatos per kuraĝ'. Ĝemado ne efikos.
 Necese estas, ke la manojn ni aplikos.
 Nun ŝipen, urĝas temp', konsolu, kara, vin.

BADELOCH.

- 1800 Sed antaŭ la disiĝ' al preĝo lasu min.
 Frat' Petro, preĝu por la trupo Difavoron,
 Anĝelo gvidu ĝin kaj ŝirmu la sinjoron.

FRATO PETER.

- Vi, de l'piuloj ŝild' kaj firma protektant',
 De l'lukt' fatala de la homoj, atestant'
 1805 En la ĉielo dum ke urbojn Vi faligas
 Kaj igas turni kaj potencojn Vi limigas,
 Kastelon en sieĝ' kompatu en subprem';
 La rajtan estron Vi protektu de l'venĝem'
 Kun la restaĵo el la urbo ekstermita,
 1810 Laŭ Dia volo sur la ondojn ekzilita.
 Vi ŝirmis Noa jam sur la altega mar' 1)
 Kun lia famili' en mezo de l'ondar'.
 La akvo levis sin, ĝis kie brilas steloj
 Kaj dronis montoj eĉ plej altaj ĝis ĉieloj.
 1815 La tuta mondo jam estiĝis vasta mar',
 Ne estis rodo plu, nek bordo de l'akvar'.
 Vi la restintojn per kolombo ja konsolis,
 Oliva branĉo pri de l'akvo fal' parolis.
 Konsolu en ekzil' malgaja same nin:
 1820 Vi konas ĉion de l'komenco ĝis la fin'

1) Vidu Genezo 6—8.

Spirito Via kaj anĝelo nin dumvoje
 Konduku kie Vin honoros ĉiuj ĝoje.

RAFAEL.

- Ho, Gysbreght, prenu sur la ŝultrojn la de Di'
 Donitan krucon kaj pri la kastelo vi
- 1825 Ne penu vane; se ni ĝin gardintaj estus
 Ja certe pli ol nun de Amsterdamo restus.
 Ne kontraŭstaru al fidela la edzin',
 Laŭleĝan domon sen ĉagren' forlasu ĝin.
 Pro la detruo de la urb' ne terurigu.
- 1830 Kun glori pli granda ĝi el cindroj reviviĝu.
 Arangas Dio en miriga manier'.
 La Holandanoj jam sin plifortigos per
 Liganoj antaŭ ol kalkulos tricent jarojn,
 El Roma preĝejoj forĵetos la altarojn; 1)
- 1835 La grafano estron el la rajtoj metos for 2)
 Kaj regos magistrat'; ĝi estos kaŭzo por
 Batal' senfina kaj milito akra venos;
 La tuta Kristanaro ĝin sange partoprenos.
 En mezo de l'batal', pro ĝi ne laca jam,
- 1840 Ĉielon per la kron' atingos Amsterdam,
 Tra fajro kaj glaci' alian mondon trovos,
 La tondron de l'pafado al ĉiuj ventoj blovos.
 Ne velkos dum la tempo de vi generaci',
 Nobeles ĉiam kaj honore daŭros ĝi
- 1845 En urboj kaj kasteloj kaj regos kun honoro.
 Antikva via nom' ne estos ja sen gloro,
 En via urbo dum teatroinaŭguro, 3)
 Montranta sur scenejoj pri viaj agoj nur,

1) Aludo pri la Reformacio.

2) Aludo pri la liberiga milito kontraŭ Hispanujo (1568—1648) kaj la fondo de la nederlanda respubliko.

3) Aludo pri la inaŭguro de la Nova Teatro, por kiu la dramo estis verkita. Komp. paĝon VI.

- Por la urbestroj kaj la kvardek konsilantoj,
 1850 Sur via ŝildo kun la krucoj la sidantoj. ¹⁾
 Do urĝe iru al la ŝipo, ĉar sen Di'
 Kaj nia helpo la kastel' pereus ĝi.
 Mi vin de l'vido per nebulo densa kaŝos
 Kaj antaŭ la popol', gvidanta stelo, paŝos
 1855 Al de la fluo mez', ne malesperu vi,
 Kaj vi obeu nur al la ordon' de Di'.
 Li volas, iru vi al grasa land' Prusujo;
 De l'montoj venas la Vistulo el Polujo;
 La bordojn riĉajn je rikolt' akvigas ĝi,
 1860 Kaj tie ĝis paciĝ' de l'venĝ, atendu vi.
 Vi tie urbon, Nov-Holandon, konstruigos;
 Aer' saniga kaj abundo forgesigos
 Pri la doloro kaj spertita subpremeĉ':
 Por viaj idoj jen la voj' al feliĉec'.

FRATO PETER.

- 1865 Vi estas Rafael? Vi, kiu sen danĝero
 Tobion kun edzin' kondukis el mizero; ²⁾
 Sendito de l'ĉiel', Moseon laŭ ordon'
 De Di' gvidinta en la form' de fajrkolon', ³⁾
 Savint' de l'pia Lot de l'fajro, minacanta ⁴⁾
 1870 La urbojn; kiu ja el forno ardeganta ⁵⁾
 La tri junulojn eĉ fortiris sen malbon'.
 Ni jam obeas vin. Ĝi estas Diordon'.

GYSBREGHT.

Mi klinas min por Di', plej kara, plej amata;
 Konsilo via nun ne restu neaŭdata.

1) La blazono de Amsterdam, enhavanta tri krucojn.
 2) Vidu la apokrifan libron Tobio III, 25.
 3) Vidu Eliro 14, verso 19.
 4) Vidu Genezo 19.
 5) Vidu Daniel 3, v. 12—28.

- 1875 Kirason lasas mi. Ne helpas kontraŭstar'.
 Se Di' de l'domo for, ne regos armilar'.
 Ekiru la popol', la korp'. Sen timo estu,
 Kun mia famili' mi ĉe la fino restu.
 Pri l'sankta krucifiks', frat' Petro, zorgu vi.
- 1880 Sur la altaro de l'gepatroj staris ĝi.
 Mi ĝin heredis kaj dum tag' kaj nokta horo
 Mi ofte antaŭ ĝi preĝadis kun fervoro,
 Dum paco kaj milit'. Aŭskultu, viroj, min:
 Jam preter fluo kaj ĉe de la Pampo¹⁾ fin',
- 1885 Maldekstre en la mar' vi vidos ja herbejon,
 Insulon Marken²⁾, la malaltan fiŝkaptejon.
 Sur ĝi Mariengaard³⁾, malnova monaĥej',
 Troviĝas, ni al ĝi, la riĉa abatej',
 Rapidu antaŭ vent' per veloj kaj remiloj,
- 1890 Provizu ŝipojn per nutraĵo kaj helpiloj
 Kaj konsiliĝu plu. Nun al la ŝipo en
 La ordo laŭ ordon'.

RIFUĜINTOJ.

Ve, estas ja ĉagren'
 Disiĝo de l'patruj', se ĉio jam perdiĝis.

FRATO PETER.

La amo al hejmland' en ĉiu radikigiĝis.

BADELOCH.

- 1895 Urb' detruita, sen reveno iras ni.

GYSBREGHT.

Atendu Aemsterland, alian mastron vi.

1) La Pampo estas malprofunda loko en la Suda Maro apud Amsterdam.

2) Marken, insulo en la Suda Maro, konata kaj vizitata pro siaj popolaj kostumoj.

3) Mariengaard, elp. Marienhart.

LINGVAJ NOTOJ.

Jam en mia „Antaŭparolo“ mi menciis kelkajn el la principoj, laŭ kiuj mi faris tiun ĉi tradukon. Mi nur volas aldoni kelkajn rimarkojn.

Pri la rimoj: Kiel jam dirite, la rimoj estas precize konformaj al tiuj de la originalo. Severe mi sekvis la regulon, ke la rimoj estu tiaj, ke la rimantaj vortoj enhavu precize la samajn literojn post la lasta akcentata vokalo. Do mi ne akceptis kiel rimojn silabojn kiel *-ant'* kaj *-and'*, kvankam en la elparolo ili estas preskaŭ la samaj. Aliflanke rimoj kiel *preĝej'* kaj *plej* estas tute akceptindaj, ĉar ili havas saman elparolon.

Pri la propraj nomoj: Por havi iom da libereco en la manipulado mi uzis de diversaj nomoj du formojn, nome la originalan nederlandan laŭ la ortografio de *Vondel* en la unua eldono de la tragedio kaj due la esperantigitan formon. Oni facile rekonos la ekvivalentajn formojn kiel: Haerlem kaj Harlemo, Waterland kaj Vaterlando, Gozewyn kaj Gozevino, Machtelt kaj Mahteldo k.t.p. Por ke oni povu elparoli la originalajn formojn almenaŭ iom korekte, mi aldonis la elparolmanieron en notoj kiel eble plej precize. La ĝustan lokon de la akcento oni facile trovos laŭ la teksto. Ĉar ili konservis sian nederlandan ortografion ili estas vortoj, kiuj ne apartenas al Esperanto kaj tial ili ne povas akcepti la esperantan deklinacion kaj mi lasis ilin senŝanĝaj kiel en la nederlanda lingvo. Kontraŭe la esperantigitaj formoj prenas la finaĵon *-o* de la substantivo kaj ili do regule ricevas la *-n* de la akuzativo.

Pri la akuzativo: Por eviti miskomprenon mi volas akcenti,

ke la predikatecan formon de substantivoj kaj adjektivoj en nerektaj komplementoj de stato mi nur uzas post verboj, kiuj enhavas la signifon de transigo el unu stato al alia. Tio signifas, ke mi uzas la nominativon post verboj, kiuj esprimas opinion, kredon k.t.p., sed kontraŭe la akuzativon post verboj, kiuj ne enhavas tiun transigan sencon, sed simple esprimas samtempecon de la ago, esprimata de la verbo kaj de la stato en kiu troviĝas la objekto de la nereкта komplemento. Tio estas la motivo, pro kiu mi uzis la akuzativon ekzemple en la linioj 810, 819, 918, 956, 991, 1076, 1156, 1397, 1398, 1577, 1578, 1741, 1742 k.a.





